Digitized by Google

single form may be used with equal clearness, especially when both words are in the same case.

NOTE.—Of course *double* correlatives are not used when the sense does not require them, and several examples of the coupling of dissimilar correlatives will be seen in later exercises.

La konjunkcioj.

The simple and most-used conjunctions—omitting the many prepositions and adverbs used as such—are:—

aŭ, or.
aŭ...aŭ, either . or.
ĉar, because.
ĉu, whether.
ĉu...aŭ, whether...or.
ĉu...ĉu, whether...whether.
des pli, so much the, the more.
do, then, therefore, consequently.
dum, whilst.
eĉ se, even if.
escepte se, unless.
ĝis, till, until.
jen...jen, now...now, sometimes...sometimes.
ju pli ..des pli, the more... the more.
kaj ceteraj, and the rest.
kaj...kaj, both and.
kaj tiel plu, and so forth, and so on.
ke, that (no relation to relative pronouns).
kiel ankaŭ, as well as, as also.
kiel ekzemple, as for example.
kondiĉe, ke, on condition that,
konsente, ke, it being agreed that.
kvankam, although.
kvazaŭ, as if.
nek, nor.
nek...ankaŭ, nor...also.
nek...nek, neither...nor.
ol, than.
por ke, in order that (note that this is almost always followed by imperative mood of verbs).
sed, but.
sekve, consequently.
tamen, however, nevertheless.
tial, so, therefore.

Note the letters k.c. are used for *kaj cetere*, etc.; k.t.p., *kaj tiel plu*, and so on; t.e., *tio estas*, that is.

Digitized by Google

Learn the affixes *-ing* and *-uj*.

-ing denotes a holder, into which one object is appropriately put. Examples: *Cigaringo*, cigar-holder; *kandelingo*, candlestick.

-uj denotes a general container or bearer. Examples: *Cigarujo*, cigar-box; *teujo*, tea-caddy; *inkujo*, ink-well; *pomujo*, apple-tree; *Anglujo*, England.

The first point to note is that these two suffixes must be kept quite distinct. The second is that there is a growing tendency to avoid the use of "*ujo*" for trees and lands, and reserve it for the general use of holder or container in the ordinary sense. It is very easy to do this by using "*arbo*" in the case of trees, as *pomarbo*, *pirarbo*, and "*lando*" in the case of lands, as *Anglolando*, *Franclando*. Therefore, although it is necessary to learn the large meaning of "*ujo*," the writer counsels the employment of the narrower sense, and the use of "*arbo*" and "*lando*" for trees and lands; except, perhaps, in poetry, etc., where the "*ujo*" is often prettier.

VOCABULARY.

aboni, to subscribe to a journal.
agento, agent.
akuzativo, accusative.
alumeto, match.
artikolo, article (gram. and liter.).
beni, to bless, *benediction*.
bonsoneco, euphony.
celi, to aim.
cigaro, cigar.
dependi de, to depend on.
direkti, to direct.
dis, has similar force as in many English words.
disigi, to separate (T).
disiĝi, to separate (I).
diversa, various, *diverse*.
do, then, as a consequence.
ebla, possible.
egala, equal.
eltrovi, to find out.
esprimi, to express.
fini, to end, to finish.
finiĝi, to finish.
fojo, time, occasion.

Digitized by Google

havigi, to get, procure.
Irlando, Ireland.
Katoliko, Catholic.
klara, clear.
konfesi, to confess, to acknowledge.
kolera, angry, *choleric.*
komuna, common, general.
konscienco, conscience.
konsonanto, consonant.
kreto, chalk.
kri, to cry, to shout.
kunmeti, to compose, to put together.
lasta, last.
ligi, to tie, to bind, *league.*
lui, to hire (property).
luigi, to let (property).
lupago, rent.
nacio, nation.
naiveco, simplicity.
najbaro, neighbour.
necesa, necessary.
nominativo, nominative.
obei, to obey.
objekto, object.
oportuna, convenient, handy, *opportune.*
paŭzo, pause.
permesi, to permit, *permission.*
piro, pear.
plori, to weep.
Polo, Pole.
postuli, to require, to exact, *postulate.*
preĝejo, church.
prepozicio, preposition.
radiko, root, *radical.*
reguio, rule, *regular.*
Romo, Rome.
senco, sense, meaning.
soni, to sound (I).
sopiri, to sigh, to long for.
tabako, tobacco.
venigi, to get (see **havigi** also).
veturi, to travel by vehicle (I).
viskio, whiskey.
vokalo, vowel.

EXERCISE 11.

La artikolo "la" estas uzata tiam, kiam ni parolas pri personoj aŭ objektoj konataj. Ĝia uzado estas tia sama, kiel en la aliaj lingvoj. La personoj, kiuj ne komprenas la uzadon de la artikolo (ekzemple Rusoj aŭ Poloj, kiuj ne scias alian lingvon krom sia propra), povas en la unua tempo tute ne uzi la artikolon, ĉar ĝi estas oportuna sed ne necesa. Anstataŭ "la" oni povas diri "l'" (sed nur post prepozicio, kiu finiĝas per vokalo). Vortoj kun-

Digitized by Google

metitaj estas kreataj per simpla kunligado de vortoj ; oni prenas ordinare la purajn radikojn, sed, se la bonsoneco aŭ la klareco postulas, oni povas ankaŭ preni la tutan vorton, t.e. la radikon kune kun ĝia gramatika finiĝo. Ekzemploj : skribtablo *aŭ* skribotablo, internacia, tutmonda (de la tuta mondo), unutaga (kiu daŭras unu tagon), abonpago (pago por la abono), manlaboro, sonserpento, fervojo, lernolibro, k.t.p. Ĉiuj prepozicioj per si mem postulas ĉiam nur la nominativon. Se ni iam post prepozicio uzas la akuzativon, la akuzativo tie dependas ne de la prepozicio, sed de aliaj kaŭzoj. Ekzemple : por esprimi direkton, ni aldonas al la vorto la finon "n"; sekve : tie (en tiu loko), tien (al tiu loko). La birdo flugis en la ĝardenon, kaj nun ĝi flugas en la ĝardeno. Tie ĉi ni uzas la akuzativon, ĉar ni volas esprimi direkton. Morgaŭ mi veturos Parizon. Mi restos hodiaŭ dome. Jam estas tempo iri domen. Ni disiĝis kaj iris en diversajn flankojn ; mi iris dekstren, kaj li iris maldekstren. Flanken, sinjoro ! Mi konas neniun en tiu ĉi urbo. Mi neniel povas kompreni, kion vi parolas. Mi renkontis nek lin, nek lian fraton. Se ni bezonas uzi prepozicion kaj la senco ne montras al ni, kian prepozicion uzi, tiam ni povas uzi la komunan prepozicion "je." Sed estas bone uzadi la vorton "je" kiel eble plej malofte (*as rarely as possible*). Anstataŭ la vorto "je" ni povas ankaŭ uzi akuzativon sen prepozicio. Mi ridas je lia naiveco (*aŭ*, mi ridas pro lia naiveco, *aŭ*, mi ridas lian naivecon). La lastan fojon mi vidis lin ĉe vi. Mi veturis du tagojn kaj unu nokton. El la dirita regulo sekvas, ke se ni pri ia verbo ne scias, ĉu ĝi postulas post si la akuzativon (t.e. ĉu ĝi estas aktiva) aŭ ne, ni povas ĉiam uzi la akuzativon. Ekzemple : ni povas diri "obei al la patro," kaj "obei la patron" (anstataŭ "obei je la patro"). Sed ni ne uzas la akuzativon tiam, kiam la klareco de la senco tion ĉi malpermesas. Ekzemple :

Digitized by Google

ni povas diri "pardoni al la malamiko," kaj "pardoni la malamikon," sed ni devas diri ĉiam "pardoni al la malamiko lian kulpon." La cigaro estas en la cigaringo kaj la tabako en la tabakujo. La fingringo kuŝas sur la tablo kaj Elizabeto kolere rigardas ĝin, ĉar ŝi ne volas kudri. La kandelingo estas malplena, ĉar ni ne bezonas lumon. Ne rompu la kremujon, ĉar ĝi estas multekosta.

ANEKDOTO.

Demando kaj respondo, inter agento kaj Irlandano.

"Vi estas bona Katoliko?"
"Ĉu mi estas?"
"Ĉu vi ne estas?" demandis la agento.
"Vi diras, ke mi estas."
"Nu, sinjoro, respondu! Kia estas via religio?"
"La vera religio."
"Kiu religio estas tiu?"
"La mia."
"Kaj kia estas la via?"
"La religio de mia patrino."
"Kaj kia estas tiu de via patrino?"
"Ŝi prenis ĉiam la viskion kune kun sia teo."
"Nu, mi ja eltrovos, kvankam vi estas tiel ruza," diris la agento, kolera pro la ridetoj de la aŭdantaro.
"Vi benas vin, ĉu ne?"
"Mi faros tion, kiam vi estos fininta la demandojn."
"Kiun preĝejon vi plej ofte vizitas?"
"La plej proksiman."
"Sed kio estas via opinio?"
"Ke vi ne eltrovos."
"Kion vi kredas?"
"Mi kredas, ke vi ne komprenas min."
"Ĉu vi konfesas?"
"Ne al vi."
"Kiun vi venigus, se vi estus mortonta?"

Digitized by Google

"La kuraciston."
"Ĉu ne la pastron?"
"Mi unue devus havigi sendoton."
"Diru al mi, do, kion vi konscience opinias."
"Tion, kion mia domluiganto opinias."
"Kaj kion li?"
"Vere, ke mi ne pagos la lupagon—kaj tion mi ankaŭ opinias."

Tiam, kolerega pro la ridoj de la najbaroj, la agento kriegis: "Respondu tuj—ĉu vi estas Roma Katoliko!"

"Mi estas," respondis la viro.
"Kaj kial vi ne antaŭe respondis tiel?"
"Ĉar vi neniam demandis min."

Respondu:—

Kiam oni uzas la artikolon "la"?
Kiuj personoj ne komprenas la uzadon de "la"?
Kiam oni povas uzi nur la konsonanton "l" sen la vokalo?
Kiel oni kreas kunmetitajn vortojn?
Kie loĝas la Rusoj?
Kie loĝas la Poloj?
Kie loĝas la Angloj?
Ĉu ni loĝas en Franclando?
Kalkulu de ok ĝis dek ok.
Kiom faras tri kaj naŭ?
Kiom estas kvinoble ses?
Kiom estas la dekoblo de dek?
Kiom estas la duono de tridek?
Kiun daton ni havas?
Ĉu estas varmege hodiaŭ?
Kie vi estas?
Kion vi faras?
Kion mi faras?
Ĉu mi sidas aŭ staras?
Kio ĉirkaŭas la ĉambron?

Digitized by Google

Ĉu la fenestro estas dekstre ?
Ĉu la pordo estas antaŭ mi ?
Kio estas antaŭ mi ?
Kien vi metis viajn librojn, kiam vi eniris la ĉambron ?
Per kio vi skribas ?
Per kio mi skribas sur la nigra tabulo ?
Ĉu la kreto estas nigra ?
Ĉu la ĉielo estis blua hodiaŭ ?
En kiu tago ni estas ?
Nomu la tagojn de la semajno.
Je kiu tago (*or*, kiun tagon) (*or*, en kiu tago) vi lernas Esperanton ?
Ĉu oni instruas vin vespere aŭ tage ?

Home Lesson 11.

Revise lecture and learn conjunctions and vocabulary.

Learn affixes.

Translate :—Tea-caddy, cream-jug, cigar-box, cigar-holder, pipe-case (for one), tobacco-pouch, matchbox, thimble, candlestick, a set of writing materials, a service for meals (one word), a flock of sheep, a herd of cattle, a forest, a dictionary, a vocabulary, a wood, a shrub, a shrubbery.

Here is what you lost. He whom you seek is not at home. Take as many books as you can carry. Do what I wish at once. If it rain to-morrow I shall not travel to London (be careful as to tense and direction).

Re-read, with care, the lecture on prepositions.

Read aloud the sentences in Exercise 11.

Digitized by Google

LECTURE 12.

CLOCK-TIME.

The methods of naming the time vary very much in different countries, and hence, for the Esperanto novice, the naming of the hours is often a puzzle when he first meets Esperantists. We shall note several ways in this lesson, but be it remembered that one simple method is much better than the various translations of national methods. Train and steamboat tables have given us already a quick and convenient style of naming the hour which is now almost international, and Esperantists generally recognise this and use the time-table method, even as most of us do in English when naming the arrival or departure of a train, etc.

Thus we say in Esperanto:—

Kioma horo estas?
Estas la deka.
Estas la dua kaj tridek.
Estas la kvara kaj tridek-kvin.
Estas la dekunua kvindek.
Estas la unua dudek-kvin.
Estas la dua horo kaj tridek-kvin, k.t.p.

Note that the ordinal number is used for the hour, and the cardinal number for the minutes, in order to avoid the possible blending of the figures, unless the word "*horo*" itself be used.

Digitized by Google

Other ways of time-telling are as follows, but though some may be used advantageously on occasion, they are not recommended for general use :—

Kioma horo estas ?
Dek minutoj de la tria (2.10).
Tri-kvaronoj de la tria (2.45).
La tria kaj duono (3.30).
La sepa kaj kvarono (7.15).
Tri-kvaronoj post la sepa (7.45).
Tridek minutoj antaŭ la tria (2.30).
Kvin minutoj antaŭ la tria (2.55).
La sesono de la sesa (5.10).
La sesono post la kvina (5.10), *k.t.p.*

Learn affixes *re-*, *-ul.*

re- denotes, as in English, *back* or *again ; reveni,* to come again ; *reiri,* to go back ; *redoni,* to give back.

-ul denotes a being remarkable for a given quality, as *belulino,* a beauty ; *riĉulo,* a rich man ; *malsanulo,* an invalid.

VOCABULARY.

amaso, crowd, *mass.*
animo, soul, *animate.*
arto, art.
aŭtuno, autumn.
aventuro, adventure.
bordo, shore, coast.
brul, to burn (I).
brulig, to burn.
diplomatio, diplomacy.
drapo, cloth, *drapery.*
efika, efficacious.
ekzist, to exist (I).
fakto, fact.
farig, to become (made) (I).
fizik, physics (science).
fotografi, to photograph.
funto, pound (weight).
ĝenerale, generally.
glaso, a glass (vessel).
griza, grey, *grizzly.*
haro, hair.

Digitized by Google

honoro, honour.
humoro, humour, temper.
ĥemio, chemistry.
insulti, to insult, to abuse.
internacia, international.
ju pli...des pli, the more... the more.
kesto, chest.
kolero, anger, *choleric.*
koloro, colour.
kontrakto, contract.
korpo, body.
kvanto, quantity.
lando, land, country.
ligno, wood.
lipo, lip.
maniero, manner.
materiaio, material.
meĥaniko, mechanics.
mezuri, to measure (T).
nombro, number.
okupi, to occupy.
originale, originally.
ovo, egg, *oval.*
panteono, pantheon.
plenumi, to fulfil, to accomplish.
praktiki, to practise.
presi, to print, *The Press.*
prezenti, to present.
princo, prince.
progreso, progress.
propagandi, to propagate.
pruvi, to prove.
pruviĝi, to prove (I).
registaro, government (collection of rulers).
reĝo, king, *regal.*
rezoni, to reason (I).
same, similarly.
scienco, science.
sendi, to send.
signifi, to signify, to mean.
sukcesi, to succeed (I).
supre, above.
tedi, to tire, *tedious.*
tegmento, roof.
teorio, theory.
tirkesto, drawer.
turo, tower.
um, a suffix having no definite meaning, employed to make certain words from a known root.
universala, universal.
verki, to write (literary or musical work).
vitro, glass (material).

moŝt- is a general title of honour. *Via moŝto* would be translated as "Your Worship," "Your Honour," "Your Lordship," "Your Grace," etc., according to circumstances. Example: *Lia reĝa Moŝto,* His Majesty.

Digitized by Google

Exercise 12.

Lia kolero longe daŭris. Li estas hodiaŭ en kolera humoro. Li koleras kaj insultas. Li fermis kolere la pordon (*note change of form of word*). Lia filo mortis kaj estas nun malviva. La korpo estas morta, la animo estas senmorta. Li estas morte malsana. Li parolas, kaj lia parolo fluas dolĉe kaj agrable. Ni faris la kontrakton ne skribe, sed parole. Li estas bona parolanto. Starante ekstere, li povis vidi nur la eksteran flankon de nia domo. Li loĝas ekster la urbo. Li tuj faris, kion mi volis, kaj mi dankis lin por la tuja plenumo de mia deziro. Kia granda brulo! Kio brulas? Ligno estas bona brula materialo. La fera bastono, kiu kuŝis en la forno, estas nun brule varmega. Ĉu li donis al vi jesan respondon aŭ nean? Li eliris el la dormoĉambro kaj eniris en la manĝoĉambron. La birdo ne forflugis: ĝi nur deflugis de la arbo, alflugis al la domo kaj surflugis sur la tegmenton. En mia skribtablo sin trovas (troviĝas) kvar tirkestoj. Liaj lipharoj estas pli grizaj, ol liaj vangharoj. Teatramanto ofte vizitas la teatron kaj ricevas baldaŭ teatrajn manierojn. Kiu okupas sin je meĥaniko, estas meĥanikisto, kaj kiu okupas sin je ĥemio estas ĥemiisto. La diplomatiisto venis kun la fizikisto. Fiziko estas la nomo de la scienco mem. La fotografisto fotografis min, kaj mi sendis la fotografaĵon al mia patro. Por ĉiu aĉetita funto da teo tiu ĉi komercisto aldonas senpage funton da sukero. Alportu al mi glason da vino. Mi mezuris metron da drapo. Mi aĉetis dekduon da ovoj. Tiu ĉi rivero havas ducent kilometrojn da longo. Sur la riverbordo staris amaso da homoj. En la ĉambro sidas nur kelke da homoj (*note the use of "da" instead of "de" when we wish to express measurement, weight, number, and so forth*). Kelkaj homoj sentas sin la plej feliĉaj, kiam ili vidas la suferojn de siaj najbaroj.

Digitized by Google

ENIGMO.

Kial maljunulo en tre alta konstruaĵo similas strangan historion?

Ĉar li estas av-en-turo.—("L.I.").

The following article has been specially written for this work by "Kabe," Dr. Kazimir Bein, a famous Polish Esperantist, who has perhaps done more for Esperanto literature than any other follower of Dr. Zamenhof. All students are advised to read his works, not only for their great and absorbing interest, but because they are recognised models for style. And with regard to style, it may be here mentioned that there are only two essential requisites, *simplicity* and *exactness*.

ESPERANTO.

1. Ekzistas nur unu internacia lingvo—Esperanto; ĉiuj aliaj tiel nomataj internaciaj lingvoj estas nur projektoj.

2. Esperantisto estas nur tiu, kiu scias Esperanton (komprenas, skribas, parolas).

3. Esperanto fariĝos universala lingvo ne tiam, kiam ĝi estos akceptita de la registaroj, sed la registaroj akceptos ĝin tiam, kiam ĝi estos lingvo universala.

4. Oni propagandas Esperanton per la rezonado, kaj prezentante faktojn, t.e., teorie kaj praktike. Ju pli multenombraj estas la faktoj, pruvoj de nia sukceso, des pli efika estas la rezonado.

5. Esperanto, ĝenerale akceptita, estos same grava por la progreso de la homaro, kiel la presarto. En la panteono de la bonfarantoj de l' homaro, Zamenhof okupos lokon same honoran, kiel Gutenberg.

Verkita por "The Esperanto Manual" de KABE.
Warsaw, July 5, 1908.

Digitized by Google

Respondu :—

Kiu prepozicio esprimas kvanton?
En kiu urbo vi loĝas?
En kiu urbo mi loĝas?
Kian lingvon vi lernis, kiam vi estis infano?
Kiun lingvon vi nun lernas?
Ĉu vi scias pli ol du lingvojn?
Kiom da lingvoj vi scias?
Kian lingvon la Germanoj parolas?
Kian lingvon la Francoj parolas?
Kiu fama Polo verkis artikoleton por nia libro?
Pri kio estas tiu artikoleto?
Kiu estas la sola bona internacia lingvo?
Kial ni ne nomas Esperanton projekto?
Dum kiom da jaroj oni jam uzis Esperanton?
Kio estas Esperantisto?
Kiel oni devas propagandi Esperanton?
Nomu unu pruvon de nia sukceso.
Kiom da kongresoj jam okazis?
Kie estis la unua?
Kie la dua?
Kie okazos la proksima?
Ĉu ĝi estos la sesa?
Kio estas tiel grava por la homaro, kiel la presarto?
Kiu elpensis la presarton?
Kiu donis Esperanton al la homaro?
Kie loĝas Doktoro Zamenhof?
Kioma horo estas nun?
Je kioma horo vi venis tien ĉi?

Home Lesson 12.

Read over lecture.
Read twice, and *aloud*, the article by "Kabe."
Learn affixes and vocabulary.
State what is the best way to name the hours.

Digitized by Google

State what simple rules govern the Esperanto noun or substantive.

Translate:—To send back, to go back, to come back, to reject, to re-catch, a poor person, an ugly person, a plain person, a miser, a chatterer, a lazy person, a tedious person, a clockmaker, a chemist, a gardener.

Once (at one time) there were a king and queen who lived in France. Their daughter was the most famous beauty in the land. One day a prince visited them, and said to the king, "Your Majesty, I wish to marry (*edziĝi kun*) your daughter." The king knew that he was a rich man and the chief of a great army (*armeo*), in whose vocabulary the word coward had been forgotten. When do you go to London? (Be careful over tense). Elizabeth read until half-past nine, and then she closed her book. She always obeyed her mother, who never pardoned a grave fault.

Digitized by Google

LECTURE 13.

One often asks "What is the correct construction of a sentence, or what is the right order of words in an Esperanto sentence?"

The answer is brief; there is no rule for construction, but one must always write simply and as far as possible in the natural sequence. It is generally best to write subject first, verb next, and object of sentence last. Place the adjective near its noun, either before or after, place the adverb near the verb, do not unnecessarily divide compound tenses, and write as you think.

After much reading in Esperanto and a little thinking, one finds that the most *natural* way of writing Esperanto is really the most correct.

The chief thing to remember, however, is that Esperanto is not for us alone, but for the whole world, and therefore we *must* write in a simple and easy style if we wish always to be understood.

Of course reading the best authors is a capital way of learning how best to phrase one's thoughts, and there is now so much Esperanto literature, and there are so many magazines and newspapers either wholly or partly printed in Esperanto, that there can be no excuse for not acquiring an international and at the same time a simple style.

The articles in this book, which have been specially written for it by members of various nations, are intended to serve several purposes, but chiefly, when all have been perused, one will note the striking similarity of the style and the total absence of national idioms. Indeed, it is impossible to detect the nationality of a fluent and careful speaker when he addresses a meeting in Esperanto.

Digitized by Google

Learn the affixes *-ej*, *-aĉ*, and *-um*.

-ej denotes a place specially devoted to what is indicated in the root, as *lernejo*, a school; *dormejo*, a dormitory, a sleeping-place.

-aĉ is a suffix invented in recent years to supply a real though rarely felt want. It conveys a sense of disparagement, or of something not worth having or mentioning. Its use may be better understood by the examples: *Hundaĉo*, a cur; *ĉevalaĉo*, a hack; *domaĉo*, a hovel; *lingvaĉo*, a jargon; and occasionally in verbs, as *manĝaĉi*, to feed poorly.

-um is a suffix with no definite meaning, similar to the preposition "*je*" in its adaptiveness. It has been used in a few words where a different shade of meaning requires to be expressed, by being attached to an already existing root. Thus we have *kolumo*, collar, from *kolo*, neck; *manumo*, a cuff, from *mano*, hand; *kalkanumo*, boot-heel, from *kalkano*, heel; *brulumo*, an inflammation, from *bruli*, to burn. Some of the best-known verbs may be seen in the following vocabulary:—

VOCABULARY.

acida, sour, *acid.*
aerumi, to air.
akvumi, to water.
aperi, to appear (I).
azoto, nitrogen.
boteio, bottle.
bovo, ox, *bovine.*
brando, brandy.
brava, brave.
bruto, a brute.
butonumi, to button.
cetero, rest, remainder.
datumi, to date.
denove, afresh, again.
duonpatro, stepfather.
fajfi, to whistle, *fife.*
fluida, fluid.
fosi, to dig.
frandi, to like dainties (I).
frosta, frosty.
Germano, German.
glacio, ice, *glacial.*
gliti, to glide, to skate (I).
gusto, taste.
gustumi, to taste, *gusto.*
haki, to hack.

Digitized by Google

hejmo, home.
herbo, grass.
heroo, hero.
Hispano, Spaniard.
hokumi, to hook.
inko, ink.
kombi, to comb.
konfiti, to preserve with sugar.
korko, a cork.
kreski, to grow, to increase, *excrescence* (I).
krucumi, to crucify.
kruta, steep.
kurba, curved.
lago, lake.
lano, wool.
larga, broad.
malvarmumi, to take cold (I).
marŝi, to march, to walk (I).
martelumi, to hammer.
mastrumi, to keep house.
mezo, middle.
militi, to wage war, *military* (I).
mola, soft, *mollify.*
monto, mountain.
naĝi, to swim, to float (I).
nobla, noble.
paki, to pack up.
palpebrumi, to wink (I).
paŝti, to pasture, to feed animals.
plaĉi, to be pleasing to.
plenumi, to fulfil.
poŝo, pocket, *pouch.*
precipe, specially, particularly.
preĝi, to pray (I).
proceso, lawsuit.
promesi, to promise (I).
renversi, to upset.
renversiĝi, to upset (I).
rifuzi, to refuse.
sablo, sand.
sako, sack, bag.
sapumi, to soap.
segi, to saw.
senti, to feel, *sentiment.*
severa, severe.
sigeli, to seal.
sorbi, to absorb.
somero, summer.
sonori, to give out sound, *sonorous* (I).
sonorigi, to ring (T).
sulfuro, sulphur.
suspekti, to suspect.
ŝafo, sheep.
ŝlosi, to lock.
ŝtopi, to stop up.
ŝtupo, step.
tiri, to draw, to pull.
tolo, linen.
tombo, a tomb.
tuko, a piece of linen, cloth.
turmenti, to torment.
utila, useful, *utility.*
vasta, wide, vast.
ventumi, to fan.
viando, meat, *viands.*
vidvo, a widower.
vinagro, vinegar.

Digitized by Google

Exercise 13.

Mia frato ne estas granda, sed li ne estas ankaŭ malgranda; li estas de meza kresko. Li estas tiel dika, ke li ne povas trairi tra nia mallarĝa pordo. Malbonaj infanoj amas turmenti bestojn. Li sentis sin tiel malfeliĉa, ke li malbenis la tagon, en kiu li estis naskita. Mi forte malestimas tiun ĉi malnoblan homon. La fenestro longe estis nefermita; mi ĝin fermis, sed mia frato tuj ĝin denove malfermis. Rekta vojo estas pli mallonga, ol kurba. La tablo staras malrekte kaj kredeble baldaŭ renversiĝos. Mi renversos la tablon per mia piedo. Li staras supre sur la monto kaj rigardas malsupren sur la kampon. Oni tiel malhelpis al mi, ke mi malbonigis mian tutan laboron. Mi vidis vian avinon kun ŝiaj kvar nepinoj kaj kun mia nevino. Lia duonpatrino estas mia bofratino. La juna vidvino fariĝis denove fianĉino. La tranĉilo estis tiel malakra, ke mi ne povis tranĉi per ĝi la viandon kaj mi devis uzi mian poŝan tranĉilon. Ĉu vi havas korktirilon, por malŝtopi la botelon? Mi volis ŝlosi la pordon, sed mi perdis la ŝlosilon. Ŝi kombas al si la harojn per arĝenta kombilo. En somero ni veturas per diversaj veturiloj, kaj en vintro ni veturas per glitveturilo. Hodiaŭ estas bela frosta vetero, tial mi prenos miajn glitilojn kaj iros gliti. Per hakilo ni hakas, per segilo ni segas, per fosilo ni fosas, per tondilo ni tondas, per fajfilo ni fajfas. Mia skribilaro konsistas el (*note "el"*) inkujo, sablujo, kelke da plumoj, krajono, kaj inksorbilo. La manĝilaro konsistis el telero, kulero, tranĉilo, forko, glaseto por brando kaj glaso por vino. En varmega tago mi amas promeni en arbaro. Nia lando venkos, ĉar nia militistaro estas granda kaj brava. Sur kruta ŝtuparo li levis sin al la tegmento de la domo. Mi ne scias la lingvon hispana [illegible] n, sed per helpo de vortaro hispana-germana mi tamen [illegible] komprenis iom vian leteron. Sur tiuj ĉi vastaj kaj [illegible] herboriĉaj

Digitized by Google

kampoj paŝtas sin grandaj brutaroj, precipe aroj da bellanaj ŝafoj. Vi parolas sensencaĵon, mia amiko. Jen estas teo, kukoj, kaj konfitaĵo. Akvo estas fluidaĵo. Mi ne volis trinki la vinon, ĉar ĝi enhavis en si ian suspektan malklaraĵon. Sur la tablo staris diversaj sukeraĵoj. En tiuj ĉi boteletoj sin trovas diversaj acidoj: vinagro, sulfuracido, azotacido kaj aliaj. Via vino estas nur ia abomena acidaĵo. La acideco de tiu ĉi vinagro estas tre malforta. (*note use of "aĵ," "eo," and the simple word "acido" itself*). Mi manĝis bongustan ovaĵon. La alteco de tiu monto ne estas tre granda. Kiam mi ien veturas, mi neniam prenas kun mi multon da pakaĵo. Manumojn, kolumojn, antaŭtukojn, buŝtukojn, littukojn, kaj ceterajn similajn objektojn ni nomas tolaĵo, kvankam ili ne ĉiam estas faritaj el (*note "el"*) tolo. Glaciaĵo estas dolĉa glaciigita (*frozen*) frandaĵo. La riĉeco de tiu ĉi homo estas granda, sed lia malsaĝeco estas ankoraŭ pli granda. Li amas tiun ĉi knabinon pro ŝia boneco kaj beleco. Lia heroeco tre plaĉis al mi. La tuta suprajo de la lago estis kovrita per naĝantaj folioj kaj diversaj aliaj kreskaĵoj. La patrino iris unue en la preĝejon kaj poste al la tombejo, kie ŝi metis belajn blankajn florojn sur la tombon de sia unuenaskita filino. El la lernejo la knabineto venis kaj malrapide marŝis al la domaĉo, kiu estis ŝia sola hejmo. Ŝia patrino estis mortinta antaŭ tri jaroj, kaj la duonpatrinaĉo estis tiel severa, ke la kompatinda infano (*note not necessary here to use infanino*) neniam volis vidi ŝin.

ENIGMOJ.

Kial la maljunaj fraŭlinoj preskaŭ ĉiam estas malsanaj?

Ĉar tre ofte ili havas kataron (*kat-ar-on*).—("L.I.")

En kiu lando oni ĉiam povas trovi nutraĵon?
En His-pan-lando.—(M.L.J.).

Digitized by Google

ANEKDOTO.

Riĉa avarulo perdis cent funtojn sterlingajn, kaj promesis, kiel rekompencon, dek funtojn al kiu ajn trovos kaj alportos al li la perditan monsaketon. Malriĉulo trovis ĝin kaj, redoninte la sakon, petis la promesitan rekompencon, sed la avarulo, por konfuzi lin kaj fine rifuzi, diris ruze ke la saketo, kiam perdita, enhavis cent dek funtojn.

Tamen, oni konsilis al la malriĉulo, ke li faru proceson pri la afero. Tion li faris, kaj la honesta juĝisto, trovinte ke la sigelo sur la saketo ne estis rompita, demandis la avarulon: "Ĉu vi estas certa, ke via perdita sako enhavis cent dek funtojn?"

"Jes, via juĝista moŝto," respondis li.

"Tio ĉi do ne povas esti via mono," diris la juĝisto, "ĉar tie ĉi estas nur cent funtoj. Tial la procesanto tenos ĝin ĝis aperos la persono, al kiu la mono vere apartenas."

Respondu:—

Kiuj amas turmenti bestojn?
Kia vojo estas pli mallonga, ol kurba vojo?
Per kio oni malŝtopas botelojn?
Per kio oni kombas siajn harojn?
El kio konsistas ordinara manĝilaro?
El kio konsistas skribilaro?
Nomu ion, kion ni nomas tolaĵo.
Nomu fluidaĵon.
Nomu manĝaĵon.
Nomu trinkaĵon.
Nomu acidon.
Pro kio oni ordinare amas la infanojn?
Kiu perdis cent funtojn?
Kio estis la promesita rekompenco?
Kiu trovis la perditan monsaketon?
Ĉu li ricevis la rekompencon?
Kiu faris proceson?

Digitized by Google

Kiu faris decidon ?
Kiu venkis en la proceso ?
Kia estas la vetero hodiaŭ ?
Kiu estas la tago hodiaŭ ?
Kiun daton ni havas ?
Kiel vi datumus leteron skribitan hodiaŭ ?
En kiu jaro okazis la lasta kongreso ?
Kie ĝi okazis ?
Kio estas super ni kiam ni promenas en arbaro ?
Kio estas sub ni, kiam ni promenas sur la kampoj ?
Kio ĉirkaŭas nin, kiam ni promenas sur la maro ?
Ĉu oni povas marŝi sur la maro ?
Kiel oni povas promeni sur la maro ?

HOME LESSON 13.

Read through lecture, and learn vocabularies and affixes.

State in a few words what rules govern the adjective in Esperanto, and in what respects it differs from an adjective in English grammar.

Translate:—A church, a school, a dormitory, a coach-house, a flower-garden, a sweet-shop, a library, a dining-room, to air, to water, to button, a hack, a slang word.

Why did he go into the library ? For some reason—perhaps he sought silence. For no reason Florence watered the shrubs after it had rained, therefore she must be a foolish person. For all reasons the study of Esperanto is useful.

Define the meanings of *mal-*, *-in*, *-il*, *-aĵ*, *-ad*, and *-an*, and give examples of their use.

Digitized by Google

LECTURE 14.

LEARN THE AFFIXES iĝ AND ig.

The explanation of the suffixes *-iĝ* and *-ig* has been omitted until now, because they merit some special remarks. They are very much alike in appearance, but are absolutely contrary in meaning, and therefore the student must pay close attention and learn to distinguish them at once.

First, it may be said that while "*ig*" converts an intransitive verb into a transitive, as *paroli*, to speak, *paroligi*, to cause to speak, "*iĝ*" on the contrary is intransitive, and is never followed by the sign of the accusative of the verb. Examples: *Ruĝa*, red; *ruĝiĝi*, to become red, to blush. *Konfuzi*, to confuse; *li konfuziĝis*, he became confused. Here you see that "*iĝ*" makes a verb of state or being, and such verbs are intransitive. Further, "*iĝ*" often has a reflexive force, and may in such cases be used as an alternative to the use of the pronoun "*si*." Example: *Li leviĝis sin*, or, *li leviĝis*, he rose; *li banis sin*, or, *li baniĝis*, he bathed.

In previous lessons many examples have been given of the utility of these two suffixes in verbs, which have been shown in pairs. For instance, *sonori* and *sonorigi*; *fini* and *finiĝi*; *fari* and *fariĝi*, etc.

-ig is a suffix which causes something to be done, denotes to make, to render. Example: *Scii*, to know; *sciigi*, to make known, to inform. *Morti*, to die; *mortigi*, to kill. *Edzo*, married person, *edzigi*, to marry (as a clergyman). *Droni*, to drown; *dronigi*, to cause to drown.

Digitized by Google

-iĝ means to become. Example: *Riĉa*, rich; *riĉiĝi*, to become rich. *Edzo*, married person; *edziĝi*, to get married. *Pliboniĝi*, to improve (oneself).

NOTE PHRASES:—

Kiel eble plej frue, As early as possible.
Kiel eble plej baldaŭ, As soon as possible.
Kiel eble plej rapide, As quickly as possible.
Kiel eble plej bone, As well as possible, etc.

VOCABULARY.

afabla, affable.
aliĝi, to join (to become to'd) (I).
altaro, altar.
anguło, corner, *angle*.
aplaŭdi, to applaud.
azeno, ass.
blovi, to blow.
boto, boot.
branĉo, branch.
brosi, to brush.
bruo, noise.
brusto, breast.
ĉapo, cap (for head).
densa, dense.
doktoro, doctor (of any faculty).
dorso, back.
eĉ, even.
fako, compartment, section.
fervojo, railway.
gratuli, to congratulate.
hebreo, Hebrew.
honti, to be ashame (I).
humila, humble.
infekti, to infect.
instrukcioj, instructions.
jena, following.
justa, just (righteous).
kaleŝo, carriage.
kapo, head.
komerci, to trade (I).
komizo, clerk.
konko, shell (of fish).
koto, mud, dirt.
Kristo, Christ.
kruco, cross.
kruela, cruel.
kuracado, a cure, a course of treatment.
kuraci, to treat (as a doctor).
kuŝiĝi, to go to bed, to lie down (I).
kvieta, quiet.
laca, weary, tired.
lasi, to leave, to allow.
mendo, order (for goods).
ombro, shadow, *sombre*.
pafi, to shoot.

Digitized by Google

pendi, to hang, *pending* (I).
pra, great- (relatives).
printempo, springtime.
provinco, a province.
rado, a wheel.
regimento, regiment.
regno, kingdom or state.
rele, a rail.
serio, series.
sezono, season.
solena, solemn.
sprita, witty, *sprightly.*
subite, suddenly.
ŝanĝi, to change.
ŝanĝiĝi, to change (I).
ŝerci, to joke (I).
ŝuo, shoe.
vagonaro, train.
vento, wind, *ventilate.*

EXERCISE 14.

Petro, Anno kaj Elizabeto estas miaj gefratoj. Mi gratulis telegrafe la junajn geedzojn. La gefianĉoj staris apud la altaro. La patro de mia edzino estas mia bopatro, mi estas lia bofilo, kaj mia patro estas la bopatro de mia edzino. Mia frato kaj fratino (gefratoj) estas la bogefratoj de mia edzino. Virino, kiu kuracas, estas kuracistino; edzino de kuracisto estas kuracistedzino. La filoj, nepoj kaj pranepoj de reĝo estas reĝidoj. La hebreoj estas Izraelidoj, ĉar ili devenas de Izraelo. Kokido estas nematura koko, kaj birdido estas nematura birdo. La ŝipanoj devas obei la ŝipestron. Ĉiuj loĝantoj de regno estas regnanoj. Urbanoj estas ordinare pli ruzaj, ol vilaĝanoj. La regnestro de nia lando estas bona kaj saĝa reĝo. Nia provincestro estas severa, sed justa. Nia urbo havas bonajn policanojn, sed ne sufiĉe energian policestron. Luteranoj kaj Kalvinanoj estas Kristanoj. Germanoj kaj Francoj kiuj loĝas en Rusujo, estas Rusujanoj (*or* Ruslandanoj), kvankam ili ne estas Rusoj. La loĝantoj de unu regno estas samregnanoj, la konfesantoj de unu religio estas samreligianoj. Nia regimentestro estas por siaj soldatoj kiel bona patro. La botisto faras botojn kaj ŝuojn. La kuraĝa maristo dronis en la maro. Verkisto verkas librojn, kaj skribisto simple trans-

Digitized by Google

skribas paperojn. Timulo timas eĉ sian propran ombron. Tuj post la hejto la forno estas varmega, post unu horo ĝi estis jam nur varma, post du horoj ĝi estis nur iom varmeta, kaj post tri horoj ĝi estis jam tute malvarma. En somero ni trovas malvarmeton en densaj arbaroj. Li sidas apud la tablo kaj dormetas. Mallarĝa vojeto kondukas tra tiu ĉi kampo al nia domo. Kun bruo oni malfermis la pordegon, kaj la kaleŝo enveturis en la korton. Grandega hundo metis sur min sian antaŭan piedegon, kaj mi de teruro ne sciis, kion fari. Antaŭ nia militistaro staris granda serio da pafilegoj. Li paliĝis de timo kaj poste li ruĝiĝis de honto. Li fianĉiĝis kun fraŭlino Berto; post tri monatoj estoŝ la edziĝo; la edziĝa soleno estos en la nova preĝejo, kaj la edziĝa festo estos en la domo de liaj estontaj bogepatroj. Post infekta malsano oni ofte bruligas la vestojn de la malsanulo. Mi sciigas, ke de nun la ŝuldoj de mia filo ne estos pagataj de mi. Ŝi edziniĝis kun sia kuzo, kvankam ŝiaj gepatroj volis ŝin edzinigi kun alia persono. En la printempo la glacio kaj la neĝo fluidiĝas. Venigu la kuraciston, ĉar mi estas malsana. Mia onklo ne mortis per natura morto, sed li tamen ne mortigis sin mem kaj ankaŭ estis mortigita de neniu; unu tagon, promenante apud la reloj de fervojo, li falis sub la radojn de veturanta vagonaro kaj mortiĝis. Mi ne pendigis mian ĉapon sur tiu ĉi arbeto; sed la vento forblovis de mia kapo la ĉapon, kaj ĝi, flugante, pendiĝis sur la brancoj de la arbeto. Sidigu vin (*aŭ* sidiĝu), sinjoro! La junuloj aliĝis al nia militistaro kaj kuraĝe batalis kune kun ni kontraŭ niaj malamikoj.

ANEKDOTO.

La malĝentila ŝercisto ne ĉiam sukcesas konfuzi la suferanton, kiel montras la jena historieto:—

Ian tagon, en vagonara fako, plena de homoj,

Digitized by Google

malsprita juna komizo volis ridindigi kvietan pastron kiu sidis en la kontraŭa angulo.

Li subite kaj laŭte demandis: "Ĉu via pastra moŝto scias la diferencon inter pastro kaj azeno?"

"Ne, mi ne scias," respondis la pastro, afable.

"Nu," diris la junulo, "la unua portas la krucon bruste kaj la alia, dorse."

"Kaj nun," demandis la pastro, "ĉu vi scias la diferencon inter malhumila junulo kaj azeno?"

"Ne, tre certe mi ne scias," respondis la junulo.

"Nek mi ankaŭ," diris la pastro, dum ĉiuj kun vojaĝantoj gaje (gaily) aplaŭdis.

For the following commercial letter, and those in the next lecture, the writer is indebted to Mr. Henry C. Stephens, whose famous inks are known all over the world. For some years past Stephens' Inks have been advertised in Esperanto; catalogues, blotters, etc., printed in that language having been sent to thousands of Esperantists in all parts of the globe.

KOMERCA LETERO.

Aldersgate Street, London.
La 25an de Junio, 1908.

Sro. Manuel Garcia, Buenos Aires.
Estimata Sinjoro,

Mi bone ricevis vian ŝatatan mendon de la 26a pasinta, pro kiu mi tre dankas vin.

Mi jam havas la komercaĵojn en manoj kaj mi enŝipigos ilin al vi kiel eble plej baldaŭ, laŭ via instrukcioj.

Sen aliaj novaĵoj en tiu ĉi momento, mi restas,

Kun kora saluto,
Via sincere,
HENRY C. STEPHENS

Digitized by Google

Respondu :—

Kie staris la gefiançoj antaŭ ol oni edzigis ilin ?
Kiel oni nomas virinon, kiu kuracas ?
Kial oni nomas la Hebreojn Izraelidoj ?
Kio estas nematura koko ?
Kiu estas pli ruza ol vilaĝano ?
Kiu estas pli sana ol urbano ?
Kion faras la botisto ?
Kion vendas la drogisto ?
Kiu verkas librojn ?
Kie ni trovas malvarmeton en somero ?
Pro kio oni ruĝiĝas ?
Kie oni ordinare solenigas la edziĝojn ?
En kiu sezono la neĝo fluidiĝas ?
En kiu sezono ni estas nun ?
Kiu sezono estas la plej varma ?
En kiu monato la vetero estas plej ŝanĝiĝema ?

HOME LESSON 14.

Read lecture and learn vocabulary.

Learn affixes and short phrases given.

State the terminations of the verb, indicative mood.

Translate:—In muddy weather my clothing gets dirty. Every morning (*ĉiumatene*) I clean my muddy shoes. (In these examples use words made from root "*pura*"). The miser married his daughter to (*kun*) a rich relative. The cruel boy wished to drown the cat in the sea, but his sister prevented (*malhelpis*) him, and the animal did not drown. The mother seated her child on the floor and sat down on the nearest chair. There she sat and wept until she grew tired (became weary). I go to bed at ten in the summer and rise at six. At what hour (*je kioma horo*) do you breakfast ?

Give definitions and meanings of the affixes "*-ar*," "*bo-*," "*-ĉj*," "*-nj*," "*dis-*," "*-ebl*," "*-ec*," and "*-edz-*."

Digitized by Google

LECTURE 15.

KOMERCAJ LETEROJ.

Commercial letters in Esperanto are not as difficult to compose as one at first imagines. Indeed, an English commercial letter, written in up-to-date business language, is probably less intelligible to the average English novice in business matters than is an Esperanto commercial letter after a simple course of lessons. This is because much in English commerce is represented by figures of speech, which, at first, woefully puzzle the young clerk or typist. On the other hand, one has always to remember, in writing Esperanto, that a figure of speech, a colloquialism, a contraction, a slang phrase, may not be used at all; and thus a commercial letter in this language is quite as comprehensible as ordinary matter, when once one knows the words which are the necessary and exact translation of the names of the goods to be mentioned.

It is not within the province of these lectures to teach commercial letter-writing, but a few examples will not be out of place. First, because they will demonstrate that Esperanto *can* be used for such a purpose, and, secondly, because these letters (being such as are actually written at the present time by well-known firms) will demonstrate the fact that Esperanto already *is* used in commerce.

It is only necessary nowadays to pick up any Esperanto magazine or newspaper, and note the advertisements of commercial wares, to understand the great strides which Esperanto is making in commercial relations. This is, perhaps, the field wherein the

Digitized by Google

future Esperanto will make its greatest exploits. Everyone knows the proverbial distaste or indifference of the average Englishman with regard to learning foreign languages; yet in commerce a knowledge of foreign languages is now indispensable. What then is the result? Simply this; that *foreign* clerks have to be employed, as a rule, or that some exceptional Englishman has to be paid a large salary in order that he may act as a general corresponding clerk. In the near future all this will be changed, for in every large business house there will be one or more clerks who can use Esperanto. When in all business houses of the world the national language *and* an auxiliary one are used, there will be no necessity for *many* languages to be employed when dealing with several countries. It is probable that the typist of the future will be expected to know Esperanto as well as, or better than, he or she may know stenography. If the present student, then, be already engaged in business, it will be seen that a knowledge of Esperanto—especially while pioneers are wanted—cannot but be a valuable acquisition.

VOCABULARY.

akcidento, accident.
almozo, alms.
anĝelo, angel.
asekura poliso, insurance policy.
asekuri, to insure.
atesto, certificate.
bagatelo, trifle, *bagatelle.*
bani, to bathe (T).
baniĝi, to bathe (I).
bankiero, banker.
barelo, barrel.
bedaŭri, to regret.
brako, arm, *bracket.*
butiko, shop.
ĉi kune, herewith.
citi, to cite, to quote.
difini, to define.
dokumento, document.
eksciti, to excite.
eksplodi, to explode (I).
eksplodigi, to explode (T).
elspezo, expense.
enspezo, income, receipts.
episkopo, bishop, *episcopal.*
esperi, to hope.
fajro, fire.
fakturo, invoice.

Digitized by Google

favori, to favour.
firmo, a firm.
fleksi, to bend, *flexible.*
fleksiĝi, to bend (I).
fremda, foreign, strange.
fulmo, lightning.
fumo, smoke, *fumigate.*
grafo, Earl, Count.
gumo, gum.
impostо, impost, duty, tax.
kapabli, to have the capability (I).
karbonpapero, carbon-paper.
kolumo, collar.
komisii, to entrust with, to commission.
konforme je, in conformity with.
kontante, for cash payment.
konto, account.
kuiri, to cook.
kuranta, running, current.
laŭdi, to praise, *laudatory.*
libera, free.
liveri, to deliver, to supply.
magazeno, stores.
manumo, cuff.
marko, mark, stamp.
memori, to remember, *memory.*
mucilaĝo, mucilage.
negoci, to trade, to do business, *negotiations.*
okaze, as it happens, by chance, on an occasion.
okazi, to happen (I).
pasinta, past.
peco, a piece.
polvo, dust.
posedi, to possess.
prezo, price.
propra, own, *proper.*
pulvo, gunpowder.
rabato, rebate, discount.
rapidi, to make haste (I).
rezultato, result.
rilate al, relating to.
samkuriere, by the same post.
ŝarĝbilo, bill of lading.
ŝati, to prize, to appreciate, to like.
ŝiri, to tear, to rend.
skatolo, small box.
skribmaŝino, writing-machine, typewriter.
ŝpari, to be thrifty, to save, *spare.*
ŝtalo, steel.
surtuto, overcoat.
ŝviti, to perspire (I).
trankvile, tranquilly, calmly.
transporto, transport.
trato, a draft.
trompi, to deceive, to cheat.
tubo, tube.
valoro, value.
vendi, to sell, *vendor.*
venĝi, to avenge.

Digitized by Google

EXERCISE 15.

En la daŭro de kelke da minutoj mi aŭdis du pafojn. La pafado daŭris tre longe. Mi eksaltis de surprizo. Mi saltadis la tutan tagon de loko al loko. Lia hieraŭa parolo estis tre bela, sed la tro multa parolado lacigas lin. Kiam vi ekparolis, ni atendis aŭdi ion novan, sed baldaŭ ni vidis, ke ni trompiĝis. Li kantas tre belan kanton. La kantado estas agrabla okupo. Du ekbriloj de fulmo trakuris tra la malluma ĉielo. La kuiristo sidas en la kuirejo. La kuracisto konsilis al mi iri en ŝvitbanejon. Magazeno, en kiu oni vendas cigarojn, estas cigarejo; skatoleto en kiu oni tenas cigarojn, estas cigarujo; tubeto, en kiun oni metas cigaron, kiam oni ĝin fumas, estas cigaringo. En la kandelingo sidis brulanta kandelo (*note* "**sidi**" *is often used to indicate that anything is in its customary place. We have a similar signification in our English word* "*reside*"). La Rusoj loĝas en Rusujo kaj la Germanoj en Germanujo. Morti pro la patrujo estas agrable. Ŝtalo estas fleksebla, sed fero ne estas fleksebla. Vitro estas rompebla kaj travidebla. Ne ĉiu kreskaĵo estas manĝebla. Via parolo estas tute nekomprenebla kaj viaj leteroj estas ĉiam skribitaj tute nelegeble. Li rakontis al mi historion tute nekredeblan. Se la vetero estos bona, eble mi vizitos vin dimanĉe. Kredeble vi volas tion. Kompreneble mi volas kaj tre deziras tion. Tiu ĉi grava tago restos por mi ĉiam memorinda. Lia edzino estas tre laborema kaj ŝparema, sed ŝi estas ankaŭ tre babilema. Li estas tre ekkolerema kaj ekscitiĝas ofte ĉe la plej malgranda bagatelo; tamen li estas tre pardonema, li ne portas longe la koleron kaj li tute ne estas venĝema. Sablero enfalis en mian okulon. Li estas tre purema, kaj eĉ unu polveron vi ne trovos sur lia vesto. Unu fajrero estas sufiĉa, por eksplodigi pulvon. Malfeliĉo ofte kunigas la homojn, kaj feliĉo ofte disigas ilin.

Digitized by Google

Mi disŝiris la leteron kaj disĵetis ĝiajn pecetojn en ĉiujn angulojn de la ĉambro. Mi foriras, sed atendu min, ĉar mi baldaŭ revenos. La suno rebrilas en la klara akvo de la rivero. Mi diris al la reĝo: "Via reĝa moŝto, pardonu min!" La sufikso "um" ne havas difinitan signifon, kaj tial la (tre malmultajn) vortojn kun "um" oni devas lerni, kiel simplajn vortojn. Ekzemple: plenumi, kolumo, manumo. En malbona vetero oni povas facile malvarmumi.

ANEKDOTO.

"Ne, ne," kolere ekkriis sinjoro, al malriĉulino, kiu petis monerojn, kiel almozon, "mi neniam donas ion al fremduloj."

"Do," ŝi rapide respondis, "tre certe vi neniam helpos anĝelon."

KOMERCAJ LETEROJ.

Aldersgate Street, London.
La 20an de Aprilo, 1908.

Sinjoro Manuel Garcia, Buenos Aires.
Estimata Sinjoro,

Mi havas la honoron sciigi al vi ricevon de via letero de la 20a pasinta, kaj respondante vian peton, mi rapidas sendi al vi, samkuriere, mian prezaron, en kiu vi trovos la prezojn kaj sciigojn pri ĉiuj miaj komercaĵoj.

Tiuj ĉi prezoj submetas sin al la rabato 20% kaj la komercaĵoj estas liverataj libere nur ĉe Londono, ĉar ĉia elspezo de transporto, imposto, k.t.p., estas al la kosto de la aĉetanto.

Miaj kondiĉoj estas nur kontante; la ŝarĝbilo, devenatesto, asekura poliso, kaj fakturo originala estos liverataj de mia bankiero, kontraŭ pago de la trato, kiun mi faros por egaligi la valoron de mia fakturo.

Esperante ke vi favoros min per viaj mendoj, mi kore salutas vin,

HENRY C. STEPHENS.

Digitized by Google

Aldersgate Street, Lôndon.
La 2an de Julio, 1908.

Sinjoro Manuel Garcia, Buenos Aires.
Estimata Sinjoro,

Mi havas la plezuron sendi al vi ĉi kune, fakturon originalan, ŝarĝbilon, devenateston, kaj asekuran polison, rilate al du bareloj enhavantaj inkojn, guman mucilaĝon, karbonpaperon, kaj rubandojn por skribmaŝinoj, ĉiuj de mia marko, kiujn mi ĵus enŝipigis al vi per vaporŝipo "Royal Prince" konforme je via mendo de la 26a de Majo pasinta.

Por egaligi tiun ĉi fakturon mi faras traton sur via firmo por la sumo £25 0s. 0d., per la London and Brazilian Bank, kiu liveros al vi la dokumentojn kontraŭ pago de la trato, laŭ la kondiĉoj nomitaj en mia unua letero.

Kun kora saluto,

Via sincere,
HENRY C. STEPHENS.

Aldersgate Street, London,
25an de Junio, 1908.

Sinjoro Carlo Rossetti, Genoa.
Estimata Sinjoro,

Mi posedas vian ŝatatan leteron de la 5a kuranta, pro kiu mi dankas vin.

Plezure mi vidas, ke vi intencas interesi vin pri miaj komercaĵoj, sed mi bedaŭras sciigi vin, ke mi ne povas akcepti viajn mendojn je la kondiĉoj cititaj de vi.

Mi neniam donas procentaĵojn kaj mi faras negocojn nur kun tiuj firmoj, kiuj sendas al mi mendojn por sia propra konto. Mi esperas, ke vi povos sendi al mi mendojn por inko laŭ tiuj kondiĉoj, kaj, kun kora saluto,

Mi restas
Via tre sincere,
HENRY C. STEPHENS.

Digitized by Google

Respondu al la demandoj :—

Kio estas agrabla okupo ?
Kiel oni nomas la tubeton, en kiun oni metas la cigaron ?
Kio estas fleksebla ?
Kio estas nefleksebla ?
Kio estas travidebla ?
Kio estas manĝebla ?
Kio estas trinkebla ? k.t.p.

HOME LESSON 15.

Study commercial letters in lecture.
Learn vocabulary.
State what is the usual termination of an adverb.
Give six adverbs which do not terminate according to this rule.
Give meanings, with examples, of the use of the following affixes :—"*-eg*," "*-ej*," "*ek-*," "*-em*," "*-er*," "*-estr*," and "*-et*."
Translate:—*Nutraĵo, malfreša, bovaĵo, šafidaĵo, fruktaĵo, sukeraĵo, terpomo, kandelingo, kandelingaro ;* an old person ; a tea-caddy ; I am in receipt of your favour of the 20th ult. ; I remain, with esteem, yours sincerely.
Translate letter to Carlo Rossetti.

Digitized by Google

LECTURE 16.

As will have been remarked, most of the roots in the Esperanto language are familiar in some form to European readers, and especially to those whose language is to some extent based on Latin.

But it has often been objected that no Asiatic race will care to learn Esperanto, because this language has nothing in common with theirs. The following articles, however, will clearly prove that this objection is quite groundless.

The first is an extract (translated from Esperanto) from a recent letter written by Count Hajaši, the Japanese Minister of Foreign Affairs, and sent to the Japanese Esperanto Association. The extract reads as follows:—

"At the present time the convenience of intercommunication throughout the world has so increased that the globe seems to have been lessened; nevertheless, the peoples of one land and another cannot sufficiently communicate with one another or exchange their ideas. What is the cause of this? The difference of languages. *Our* Esperanto aims at the removal of this barrier and the enabling of the peoples of all parts of the world to understand one another by using the easiest common language. Although the English and French languages are comparatively extended beyond the boundaries of their own lands, nevertheless, the former, as the language of commerce, and the latter, as that of social intercourse, not only differ in their spheres of influence, but are used by only a comparatively small proportion of mankind. Consequently, in comparison

Digitized by Google

with the work of learning them, their utility is too small. It is for this reason that we intend to make Esperanto an international language. Therefore, it would not be an exaggerated expression to say that our cause is an evangel to the whole world.

"Especially at the time when our fatherland, which for centuries closed its doors to other nations, now rises suddenly and enters into relations with European and American lands; when intercommunication, not only with the Asiatic continent, but also with many different lands, becomes more and more intimate, difference of language is a great hindrance and loss. In order that the Empire may not fall behind in the civilisation of the world, it is necessary that the learning of foreign languages should spread. However, one cannot learn many European and other languages. *It is for this that our Association recommends Esperanto to our fellow-countrymen."—Translated from "Japana Esperantisto."*

When all the world has awakened to the enterprise of the Japanese, such an extract as the above can cause no surprise to us.

The following article has been expressly written for "The Esperanto Manual" by a young Chinese student in Liverpool. He had only just commenced the study of Esperanto when the writer became acquainted with him through the medium of the Esperanto group of Liverpool, but his fervour induced the request for an article. He, therefore, very kindly (for his studies leave him no free time), wrote the following in English, which the author of this Manual has translated.

The article may be read as an exercise for this lecture.

Digitized by Google

VOCABULARY.

afero, affair, cause, matter.
akiri, to acquire.
Belgo, a Belgian.
ĉefa, chief.
civilizacio, civilisation.
disvastigi, to spread abroad.
dubo, doubt.
eduki, to educate, bring up, rear.
efektive, in effect, in fact, really.
ekzemplero, a sample, copy (of book, etc.).
ekzemplo, example.
eldoni, to publish, to issue.
elpensi, to think out, to invent.
entrepreni, to undertake.
Eŭropo, Europe.
evolucio, evolution.
fervoro, fervour.
grade, gradually.
grava, grave, important.
ĝusta, exact, correct.
Ĥino, a Chinese.
katalogo, catalogue.
klopodi, to take trouble about anything (I).
komenci, to commence.
kompanio, a company.
kontroli, to check, supervise, *control*
membro, member.
ministro, minister.
miri, to wonder (I) *miracle.*
mirinda, wonderful.
observi, to observe, watch.
Okcidenta, Western, *Occidental.*
Orienta, Eastern, *Oriental.*
peni, to take pains, to endeavour (I).
perfekta, perfect.
popolo, a people, *populace.*
publika, public.
raso, race, breed, *racial.*
redakti, to edit, *redaction.*
regi, to rule, control.
rimedo, remedy, means.
rolo, rôle, part.
sama, same.
ŝanco, chance, luck.
ŝati, to prize, to appreciate, to like.
solvo, solution, *solve.*
speciala, special.
sperto, experience.
stilo, style.
subteni, to support, to uphold.
taŭgi, to be fit for, to suit (I).
tempo, time.
traduki, to translate.

Digitized by Google

Exercise 16.

Pri la neceseco, ke la Ĥinoj alprenu Esperanton, kiel nacian lingvon.

Tre certe Esperanto estas por la tuta mondo, kaj ne nur por la Ĥinoj; sed, ĉar mi estas Ĥino, mi pli bone povas priskribi kial estas eĉ pli necese ke la Ĥinoj lernu ĝin, ol ke la tuta mondo tion faru.

Estas bone konate, ke la skribata lingvo de la Ĥinoj estas la plej malfacile-lernebla afero en la tuta mondo; kaj ankaŭ estas konate, ke malfacila lingvo povas malhelpi la progresadon aŭ evolucion. Tial, mia popolo iom post iom vekiĝas pri la fakto ke nia nuna skribata lingvo tute ne taŭgas por la universala instruado, kaj ili klopodas trovi pli facilan lingvon.

Samtempe la Ĥinoj komencas forte ŝati tion, kio estas nomita "Okcidenta Civilizacio," kaj ĉiu kredas ke la scio de iu aŭ alia Eŭropa lingvo estas necesa posedaĵo.

Nu, estos multe pli bone por ni, se ni akiros la du aferojn samtempe. Kiel ni povas fari tion? La sola solvo de tiu problemo estas, ke ni alprenu unu el la Eŭropaj lingvoj kiel nian nacian, aŭ, ke ni elpensu novan, kiu enhavos ĉiujn komunajn radikojn de ĉiuj Eŭropaj lingvoj kaj neniun el la specialaj malfacilaĵoj troveblaj en ili.

Sed tion, oni facile *diras*, oni ne facile povas *fari;* kaj plue, eĉ se ni povus starigi tian lingvon, ni ne povus perfekte kontentiĝi, se la Eŭropaj popoloj ne ŝatus ĝin kaj ne volus lerni ĝin.

Nu, tre bonŝance, mirinda nova lingvo, kiu povus utili al ni ĉiamaniere, kian mi priskribis, jam ekzistas kaj simple atendas ke ni alprenu ĝin.

Kiu estas tiu lingvo? Ĝi estas Esperanto.

Verkita por "The Esperanto Manual" de
Tseng-kao Yang.

Liverpool, July, 1908.

Digitized by Google

For the following letter the writer is indebted to the courtesy of the Oliver Typewriter Co., Ltd., London :—

KOMERCA LETERO.

75, Queen Victoria Street, London, E.C.
Julio la 20an, 1908.

Estimata Sinjoro,

Enfermitan ni havas la honoron sendi al vi fruan ekzempleron de nia Katalogo pri la Skribmaŝino Oliver tradukitan Esperanten, kiun ni ĵus eldonis, por ke ni povu helpadi la disvastigon de tiu ĉi helpa lingvo.

Ĝiu ĉi, kredeble, estas la unua libreto ĝis nun redaktita en la lingvo Esperanto pri la skribmaŝino.

Sendube la skribmaŝino ludos gravan rolon en la disvastigado de tiu ĉi internacia lingvo, sekve ni faris kelkajn ŝanĝojn en nia maŝino, por ke ĝi plenumu la postulojn de la lingvo; kaj, kompreneble, ni opinias ke la plej bona rimedo por altiri la atenton de la Esperantistoj al nia entrepreno estas publikigi plenajn sciigojn pri nia maŝino per la lingvo mem, precipe por la utilo de tiuj Esperantistoj, kiuj ne komprenas la ĉefajn lingvojn de la mondo, en kiuj ni jam de multaj jaroj eldonis libretojn.

Ni estas certaj, ke la peno kaj entrepreno, kiujn ni nun montras prezentante al ili tiun ĉi eldonon en ilia kara lingvo estos ŝatataj de la fervoraj laborantoj kaj subtenantoj de la movado Esperantista.

Ni devas aldiri, ke ni klopodis, ke tiu ĉi libro eliru tradukita laŭ la plej ĝusta kaj pura stilo de la internacia lingvo, kaj tion ĉi ni ricevis akceptante la afablan helpon kaj kunlaboradon de sperta membro de la Brita Esperantista Asocio, kiu kontrolis la tutan eldonadon.

Kun alta respekto,
THE OLIVER TYPEWRITER CO., LTD.

Digitized by Google

ANEKDOTO.

Du junaj Irlandanoj estis okaze en vagonara akcidento.

Unu, trovinte sian amikon, diris, maltrankvile:

"Patriko, se vi estas mortinta, ĉu vi ne almenaŭ diros tion?"

"Ha, mia amiko," la alia respondis, "mi efektive ne mortis, sed mi ja ne estas kapabla paroli."

Respondu al la demandoj:—

Al kiaj lingvoj Esperanto plej similas?
Ĉu la orientaj popoloj povas lerni ĝin?
Ĉu ili trovas ĝin facila?
Kiu fama Japano skribis pri Esperanto?
Kiu li estas?
Ĉu la Ĥinoj ankaŭ povas lerni Esperanton?
Kiu Ĥina afero estas tre malfacila?
Kio povas malhelpi la progresadon?
Kion la Ĥinoj komencas ŝati?
Kion ili volas akiri?
Kiu lingvo estas tre taŭga por ili?
Kiu diras tion?
Kiu Angla kompanio eldonas katalogon Esperantan?
Ĉu per la skribmaŝinoj oni povas skribi Esperanton?
Kio ludos gravan rolon en la disvastigado de Esperanto?
Kian veteron ni havas hodiaŭ?
Kiun daton ni havas?
Ĉu vi scias la stenografion?
Ĉu vi laboras en oficejo?
Ĉu vi laboras en butiko?
Ĉu vi instruas en lernejo?
Ĉu vi havas gefratojn?
Ĉu ili lernas Esperanton?
Kia lingvo estas Esperanto?

Digitized by Google

Kiu elpensis ĝin?
Kie loĝas Doktoro Zamenhof?
Kiom da lingvoj oni parolas en Pollando?
Ĉu vi loĝas en Polujo?
Kie vi loĝas?
Kian lingvon oni parolas en Anglolando?
Kian en Franclando?
Ĉu la Germanoj parolas France?
Kiom da lingvoj vi scias?
Ĉu la Rusoj parolas Pole?
En kiu lando la Belgoj loĝas?
Kie la Ĥinoj loĝas?
Kie loĝas la Japanoj?

HOME LESSON 16.

Read aloud Exercise 16 and the commercial letter.

Learn vocabulary.

State what rules you learned regarding the prepositions.

Write a translation of the article by Tseng-kao Yang.

Write a translation of any short anecdote from English, and attach the translation to the English text.

Digitized by Google

LECTURE 17.

VOCABULARY.

afrankite, post-free.
akurata, prompt, precise, *accurate.*
aludi, to allude to.
anonci, to advertise, to announce.
apenaŭ, hardly, scarcely.
atesti, to witness, *attest.*
avida, eager.
biciklo, bicycle.
bonveni, to welcome.
bonvolu, kindly...(have the good will to).
buliko, roll (of bread).
ĉeno, a chain.
cigaredo, cigarette.
detalo, detail.
detrui, to destroy.
eksperimento, experiment.
epiteto, epithet.
eviti, to evade, to avoid.
flegma, phlegmatic.
forlasi, to forsake.
garantii, to guarantee.
grupo, group.
gvidi, to guide.
haveno, haven, port.
imagi, to imagine.
jene, as follows :—
kartono, cardboard (box).
konvena, seemly, becoming.
konverti, to convert.
kvalito, quality.
larmo, tear.
limo, limit.
manki, to be wanting, to be lacking (I).
mendo, order (for goods).
modelo, model.
monopolo, monopoly.
okazo, occasion.
paŝi, to step, to pace (I).
persisti, to persist (I).
plaĉi, to be pleasing.
pretendi, to claim, to pretend to.
proponi, to offer, to propose.
pruvi, to prove.
regali, to regale, to treat, to entertain.
rezervi, to reserve.
sindikato, syndicate.
sindonemo, devotion, self-sacrifice.
sono, sound.
specimeno, specimen.
tremi, to tremble (I).
turni, to turn (T).

For the following correspondence of the Esperanto Tobacco Syndicate the author is indebted to Mr. G. Douglas Buchanan, who, in Scotland, is one of the best-known pioneers of Esperanto as a commercial language.

Digitized by Google

KOMERCA LETERO.

The Esperanto Tobacco Syndicate,
Tobacco Importers and Exporters,
137, West Regent Street, Glasgow.
La 23an de Julio, 1908.

Estimataj Sinjoroj,

Ni bone ricevis vian afablan mendon, kiun ni tre ŝatas. Ni bedaŭras ke estas preskaŭ tute neeble plenumi ĝin, ĉar la malpermesoj de la fremdaj registaroj kaj la severaj limimpostoj rilate al tabakaĵoj tre malhelpas. Vi eble jam scias, ke en via propra lando la vendado de tabakaĵoj estas registara monopolo, sekve vi devas mendi nur tiom da cigaredoj kiom vi mem bezonas, kaj antaŭe vi devas ricevi permeson de la oficisto, kiu zorgas pri tiaj aferoj.

Ni estas tre kontentaj pro via amika aludo al la merito de la "Cigaredo Esperanto." Multaj, kiuj aĉetis ilin en Cambridge, komplimentis nin pri la kvalito.

Bonvolu akcepti la esprimon de nia alta estimo,
Vere via,
TABAKA SINDIKATO ESPERANTISTA.

POŜTKARTO.

The Esperanto Tobacco Syndicate,
137, West Regent Street, Glasgow.
(Dato kiel ĉe poŝta stampo).

Estimata Sinjoro,

Rilate al' via afabla demando, niaj specialaj prezoj al Esperantistoj por la "Cigaredo Esperanto" estas jene (afrankite):—

Specimena kartono da 20, Unu Ŝilingo.
Kartonego da 100, Kvar Ŝilingoj.

Bonvolu sendi la monon kun la mendo.
Vere via,
TABAKA SINDIKATO ESPERANTISTA.

Digitized by Google

The late well-known firm of Gormly's Limited, Liverpool, permitted the publication of the following letter:—

Bicikloj kaj Aŭtomobiloj.

GORMLY'S LIMITED,
7, Berry Street, Liverpool.
La 17an de Julio, 1908.

Estimata Sinjoro,

Respondante al la via, ricevita hodiaŭ matene, ni sendas ĉi kune nian Katalogon, kiu donas al vi detalajn klarigojn pri niaj modeloj. Tamen se vi deziras ke ni liveru biciklon laŭ ia speciala postularo, ni estos tre kontentaj kaj citos la plej malaltan prezon, eksciinte viajn dezirojn.

Ni scias, ke estas eble ljveri biciklojn je pli malalta prezo, ol tiuj cititaj de ni; efektive ni povus fari tion se ni dezirus; sed ni pretendas ke malaltgrada, malbonkvalita biciklo ne estas akceptinda al la inteligenta biciklisto. Niaj maŝinoj, kiel ni tiujn anoncas, estas proponataj je la plej malaltaj prezoj akordigeblaj kun bona valoro—ĉiuj materialoj kaj laborajoj estas tute fidindaj. Ni garantias ĉiun biciklon dum du jaroj post la aĉeto.

Esperante ricevi vian mendon,

Ni estas, via fidele,
GORMLY'S LIMITED.

P.S.—Al la Esperantistoj ni faras specialan rabaton 10%.

Tradukita de M.L.J.

The following article has been specially written for "The Esperanto Manual" by Mr. John Ellis, one of the very first Esperantists in England, who, together with Mr. Joseph Rhodes, founded the first English group, in Keighley, Yorkshire.

Digitized by Google

Exercise 17.

Tio, kion la mono ne povas aĉeti.

Ĉar mi prenas la rolon de atestanto, kiu parolas pri memobservitaj faktoj, vi pardonos la neeviteblan "miecon" de mia simpla rakonto.

Kiam, en la jaro 1902, mi ĵus lernis Esperanton, kaj legadis la esprimojn "la kara lingvo," "la sankta afero," mi malŝate ridetis. Mi sciis, ke nia lingvo estas bona, facila, fleksebla, belsona, taŭga, k.c., sed *kara* kaj *sankta* estas epitetoj, kiujn flegma Anglo rezervas por tio, kion li plej alte estimas. Tiaj vortoj mi opiniis ne konvenis al nura lingvo.

La sekvintan jaron, la Esperantista Grupo en Havre anoncis, ke ĝi plezure akceptos viziton de alilandaj Esperantistoj. Mi estis unu el seso da Angloj, kiuj avide kaptis la okazon. Mi pensis, ke mi pruvos la lingvon per eksperimento, ĉar ĝis tiam mi ne kunparolis kun alilandulo en Esperanto. Mi jam antaŭe vizitis Francujon; efektive, je diversaj okazoj, mi pasigis tie tri monatojn, kaj mi malamis ĉiujn ĝiajn loĝantojn, ĉar dum la tuta tempo, kiam mi tie loĝis, la Francoj igis min senti, ke mi estas ridinda, malestiminda fremdulo. Imagu, do, mian surprizon, kiam la ŝipo eniris en la havenon je la sesa horo matene, kaj mi trovis sur la enŝipejo dudekon da Esperantistoj, sinjorinoj kaj sinjoroj. Ili leviĝis tiel frue por bonvene saluti kelkon da nekonatoj, kiujn, ĝis tiam, ili apenaŭ konis nome; kun kiuj ekzistis nenia amikiga interligo, krom Esperanto. Unu el ili tenis en la mano bulkon, kiun li aĉetis rapidante tra la stratoj; li forlasis sian ordinaran matenmanĝon, por ke li ne estu malfrua. Dum la francoj gvidis nin al nia hotelo, alia Esperantisto alvenis, kurante, kun la okuloj duon-fermitaj pro manko de la dormado; li estis laborinta ĝis la dua matene, mallonge dorminta,

Digitized by Google

kaj petis pardonon pro sia malakurateco. Kaj kiel mi priskribos en mallonga artikoleto la gastamecon, la sindonemon, la regaladon, festenojn, la verajn amindaĵojn, kiujn ni ricevis dum la dekunu tagoj, kiujn ni pasigis en Havre? Ja, vere kortuŝita mi estis, la larmoj venis en la okulojn, kaj la voĉo tremis, kiam mi, ĉiel nesufiĉe, penis publike danki miajn novetrovitajn amikojn por ĉiaj iliaj neforgeseblaj bonfaroj.

Kaj tiam mi eksciis, ke Esperanto havas plej mirindan efikecon ĝis tiam nekomprenitan de mi; ĝi povas fari amikojn el malamikoj; ĝi povas konverti malamon al amo; ĝi povas detrui la nacian malamon, malbonan kreskaĵaĉon, kiu floradas rapide kaj persiste, spite niaj pli bonaj sentoj. Mi ekkomprenis, kial oni nomis Esperanton "la kara lingvo" kaj "la sankta afero," kaj mi ridetadis, ne plu pro malŝato, sed pro nova sento, nova plezuro, kaj daŭra ĝojo.

Tiun ĉi daŭran ĝojon vi ankaŭ povas havi. La vojo estas tute libera; enpaŝu en Esperantujon kuraĝe, kore, sindoneme, kaj vi ricevos pli, ol vi donos. Vi ricevos tion, kion la mono ne povas aĉeti.

Verkita por "The Esperanto Manual" de JOHN ELLIS (*Membro kaj akademiano de la Lingva Komitato, F.B.E.A.*). (*Esperantisto No.* 7124).

Keighley, England, July, 1908.

Respondu al la demandoj:—

Kion la mono ne povas aĉeti?

En la jaro mil naŭ cent dua ĉu Sinjoro Ellis komprenis la esprimon "la kara lingvo"?

Kial?

En kiu jaro li unue vizitis Esperantan grupon en fremda lando?

En kiu lando estis tiu grupo?

Kiom da Angloj vizitis tiun grupon?

Kiam la ŝipo alvenis, kiuj troviĝis?

Digitized by Google

Kion unu tenis en la mano ?
Kion li forlasis ?
Ĝis kiu horo matene laboris la dormema Esperantisto ?
Kiuj gvidis la Anglojn al la hotelo ?
Kiom da tagoj ili pasigis en Havre ?
Kion Esperanto povas fari ?
Kiom longe vi lernas Esperanton ?
Kio estas Esperanto ?
Ĉu ĝi estas malfacila lingvo ?
Ĉu estas multe da reguloj en ĝi ?
Ĉu vi jam povas legi ĝin ?
Ĉu vi povas skribi ĝin per la skribmaŝino ?
Kio estas la celo de Esperanto ?
Ĉu Esperanto plaĉas al vi ?

HOME LESSON 17.

Read aloud Exercise 17.

Learn vocabulary.

Take any Esperanto root, and make as many *parts of speech* from it as you can, and then use these grammatical forms in different sentences.

Give the meanings, with the uses of "*ge-*," "*-id*," "*-iĝ*," "*-ig*," "*-ind*," and "*-ing*."

Translate:—*Juvelisto, ĉenero, eble, lanaĵo, lavejo, levilo, kunigi, ĉiutage, edziniĝi, antaŭtuko, poŝhorloĝo.*

Translate an English anecdote, and present it for correction with the English text attached.

Digitized by Google

LECTURE 18.

The more we study Esperanto, the more we see that it has been invented to suit the whole world, and no one special race. The more we read of what Esperanto is doing, the more we see that it is indeed fit for the use of all races. And finally, the more we read Esperanto literature, the more we understand through it that the people of other countries are indeed our brothers and sisters, thinking practically the same thoughts, and living practically the same lives as ourselves. Language has been the great barrier to knowledge. We have been so apt to think of any foreigner almost as of a barbarian that Esperanto often paves the way, first, to humility, and then to generous praise of our foreign neighbours.

To fully understand this, one need only be present at an Esperanto Congress, and then one will find that apart from—the very few—national peculiarities and customs (even now gradually becoming less and less pronounced) all peoples are similar in reality, and are all members of God's great family. Then comes the surprising knowledge that in matters of education, at least, many of these "barbarians" can make us feel ashamed. The great result, after several years of the schooling of such international gatherings, will be that ugly corners will be rubbed away, and each nation will give and take to such an extent that the whole world will become the common home of all.

But we cannot all attend the Congresses, and for those who cannot travel there are still many ways of learning and of promoting an international brotherhood. One of these is reading.

Esperanto literature is now so great and varied

Digitized by Google

that it offers a rich field to the reader. Not only are stories and verses composed in the language, but translations of the greatest national works, such as those of Shakespeare, Molière, Tolstoy, and others, are constantly appearing. Too often the good works of other lands have been sealed books for the English, because we would not learn foreign tongues—but now Esperanto translations are appearing which are not only easy to read, but which exhibit a style truer to the original than any other translation known. This is because of the flexibility and richness of Esperanto.

The student should commence with some easy reading-book containing anecdotes or short stories, and afterwards proceed to longer stories, plays, or scientific works. The teacher will always be able to recommend such books as are suitable. If the student has no teacher, he should write to the local Esperanto Office, or to the British Esperanto Association, London. The literature is not dear, for the prices of stories, collections of stories, translations, and even long works, vary from sixpence to a few shillings.

The next best method is that of correspondence with a foreigner. Very often the student says "I am not yet sufficiently adept," or, "I will wait until I know the language thoroughly." But such protests are not wise, and one should not delay too long—for the simple reason that correspondence is one of the best means for correcting one's small errors and of surmounting many little difficulties caused by the inclination of the beginner to use national idioms, etc. And no student who has faithfully followed the lessons in the "Manual" should be *now* too much of a novice to commence a correspondence. There are hundreds of students on the Continent and elsewhere eagerly awaiting English correspondents—and they, too, know that they are not yet adepts—but *they* do not hesitate on that account to commence writing to

Digitized by Google

fellow students. You need at first write but little, and the very simplest sentences will suffice. But, little by little, you will grow so interested that you will need all your vocabulary; and ere you know it, by commenting on your correspondent's errors, applying your experience to your own work, and thinking carefully over each sentence ere penning it, you will have become a fluent writer. Then for you will dawn a new day; you will grow to like and to admire your new friends, and to feel with all true Esperantists that you will, nay *must*, do all that you can to further an international goodwill. And in the matter of correspondence, here again the teacher may help you, or if not, you may select any addresses you desire from one or more of the numerous magazines publishing enquiries every month.

La interjekcioj.

There are not very many interjections or exclamations as yet in Esperanto, but no doubt their number will be increased as constant use of the language may show the need for such.

Of course many may be made from the simple roots already learned, but the following list shows the most usual :—

adiaŭ / adieu, goodbye!
ah / ah!
antaŭen / forward!
bis / encore!
bone / good!
bonvenu / welcome!
brave / bravo!
certe / certainly!
efektive / really!
fi / fie!
for / away! be off!
ha / ha! ah!
he / halloo! hey!
ho / O! oh! ho!
ho ve / alack! alas!
hura / hurrah!
ien / lo! behold! see!
kompreneble / of course!
nu / well!
nu, do / well, then!
oho / O ho!
ve / woe!
vere / really! truly!
vivu / long live!

Digitized by Google

VOCABULARY.

baro, a bar.
batali, to fight (I).
bieno, estate.
blinda, blind.
defendi, to defend.
dialekto, dialect.
dividi, to divide.
dogmo, dogma, doctrine.
envolvi, to wrap up, to wrap in, *involve.*
fadeno, thread.
fondi, to found.
gento, a tribe, race, clan.
ideo, idea.
interpretanto, interpreter.
izoleco, isolation.
kaŝi, to hide.
kialo, reason, a "why."
kruĉo, jug, *cruse.*
kvazaŭ, as if.
literaturo, literature.
metalo, metal.
milda, mild.
mirakio, miracle.
misio, mission.
modesta, modest, simple.
motivo, motive.
neŭtrala, neutral.
origino, origin.
paco, peace.
patrioto, patriot.
patriotismo, patriotism.
perei, to perish (I).
persekuti, to persecute.
poeto, poet.
potenco, power, *potential.*
prava, right.
produkti, to produce.
profeto, prophet.
protekti, to protect, to be patron of.
rabi, to rob.
reciproka, reciprocal.
reto, net.
rezulti, to result (I).
rubando, ribbon.
sango, blood, *sanguinary.*
sapo, soap.
superakvego, flood.
teksaĵo, tissue, *textile.*
trudi, to intrude.
tualeto, toilet.
verŝi, to pour.
viŝilo, towel.
vualo, veil.
vundo, wound, hurt.

The article on Internationality (Exercise 18) was specially written for this work by Sinjorino Hankel, a German lady, living in Dresden, who was one of "*La kvaro por la kvara.*" When contributing the article she wrote that the subject gave her lively pleasure, and that in it she expresses her own thoughts.

Digitized by Google

Exercise 18.

La Internacieco.

Estas rimarkinda fakto, ke la plej simplaj verajoj estas tre malfacile troveblaj. La homaro bezonas multajn miljarojn por kompreni ilin; ĝi kvazaŭ estas blinda kaj surda, ĝis fine la vualo, kaŝanta la veron, malaperas. Nun la homoj miras kaj ĝoje akceptas la "novan senton."

Tia nova sento estas la ideo de la internacieco, pli simple dirita, la kompreno, ke la homaro nur estas unu familio, ke ni ĉiuj estas fratoj. Certe, jam de longe, profetoj kaj poetoj tion antaŭsentis, la milda Buddha kaj da helpema Jesuo predikis tiun ĉi dolĉan dogmon, sed nur malmultaj homoj komprenis la altan sciencon. Riveroj da sango fluis pri religiaj aferoj, malamikeco dividis la popolojn, ili starigis murojn unu kontraŭ la alia; estas preskaŭ miraklo, ke ili ne pereigis sin reciproke. La bestoj jam de longe lernis ke iliaj gentoj ne devas interbatali, la homoj tion ne sciis. Ili ne sciis, ke ili estas kvazaŭ unu granda teksaĵo, kies fadenoj estas interligitaj, kaj tial, ke disŝiro en unu punkto malbonigas la tutan reton. La homaro ne sciis, ke ĝi estas unu korpo, ke vundo ĉe unu parto malsanigas la tutan korpon.

Kiel tio povis okazi? Kial oni ne komprenis la instruadon de la fondintoj de religioj? Jen eble la kialo! apud la pacaj religiaj paroloj kaj samtempe kun ili, oni predikis la dogmon de la nacieco, de la patriotismo. Kaj tiu ĉi patriotismo enhavis kaj envolvis la ideon de la malamikeco kontraŭ la najbaro. Certe, se la najbaro estas malbonulo, kiu rabas al mi bienon kaj posedaĵon, mi devas protekti kaj defendi min, sed se li estas trankvila homo, ne ekzistas motivo por malamikeco. Ĉiu homo amas sian familion, ĉu rezultas do el tio, ke li devas malami ĉiujn aliajn familiojn? Certe ne! Kontraŭe, li bezonas la helpon

Digitized by Google

kaj la kunlaboradon de la najbaroj, tial estas saĝe ne persekuti ilin. Ni bezonas la aliajn homojn; tiu ĉi simpla, memkomprenebla ideo iom post iom sin trudas al la homoj; ĝi estas la origino de la internacieco.

Izoleco ne plu estas ebla. Ĉiu lando bezonas la produktaĵojn de aliaj landoj: nutraĵoj, teksaĵoj, metaloj estas al ni necesaj. Tion, de longe, sciis la komercistoj. Tial, paceme ili travojaĝis la mondon; ili ligis la unuajn rubandojn inter la popoloj. Al ili sekvis la scienculoj. La scienco, la literaturo estas posedaĵoj de la tuta mondo; la historion de la homoj, bestoj kaj teraĵoj oni ne povas studadi nur en sia propra nacio; oni bezonas la tutan mondon.

Por tiuj ĉi klopodoj kaj celadoj (ilia nombro estas senlima) la diverseco de la lingvoj estas ĉiam granda malhelpaĵo. Sed la homoj opiniis, ke tio ne estas ŝanĝebla; ili sin helpis tiel bone kiel eble per tradukantoj kaj interpretantoj. Ili sentis la grandan baron—forigo ne ŝajnis farebla; ili eĉ tion ne volis nek deziris, ĉar estis ja tiel la volo de Dio. Krom tio, ili opiniis, bona patrioto nur amas sian patran lingvon kaj malamas la lingvojn de alilandaj patriotoj. Densaj vualoj kaŝis la fakton, ke la diverseco de la lingvoj nur estas la sekvo de la disigo de la gentoj per montaroj, riveroj, maroj, aŭ per la forta volo de potencaj reĝoj; ke la lingvoj nur estas dialektoj, aliformiĝadoj de la homa esprimmaniero. Modestaj pensuloj iom post iom antaŭsentis tiun veraĵon kaj fine—kiam la tempo alvenis, ke la mondo efektive bezonis komunan internacian lingvon—la viro naskiĝis, kiu solvis la problemon, kiu elpensis neŭtralan lingvon, simplan, belan, bonsonan, nian karan ESPERANTON.

Verkita por "The Esperanto Manual" de
MARIE HANKEL.

Dresden, July, 1908.

Digitized by Google

Respondu al la demandoj :—

Kio estas rimarkinda fakto ?

Kiom da jaroj la homo bezonas por kompreni la verajojn ?

Kio estas la nova sento ?

Kio estas unu familio ?

Kiu antaŭsentis tion ?

Kiu predîkis tion ?

Kio fluis antaŭ ol la homaro komprenis ĝin ?

Kio dividis la popolojn ?

Kio estas preskaŭ miraklo ?

Kion la homaro similas ?

Kial oni ne tuj komprenis la instruadon de la profetoj ?

Kion la patriotismo malprave predikis ?

Ĉu la najbaro estas nia malamiko ?

Kion ĉiu homo amas ?

Kion li tre ofte, kaj malprave, malamas ?

Kion ni ĉiuj bezonas ?

Kion nia lando bezonas el aliaj landoj ?

Kio ligis la unuajn rubandojn inter la popoloj ?

Kio tion sekvis ?

Por studadi bone, kion ĉiu nun bezonas ?

Kio estas granda malhelpajo ?

Kiel la homoj pasintaj forigis tion ?

Kion ili pensis pri la malsameco de la lingvoj ?

Kio estas la vera kaŭzo de la diverseco de la lingvoj ?

Kiu naskiĝis por forigi la barilon ?

Kio estas la forigilo ?

Home Lesson 18.

Read lecture and learn vocabularies.

Translate part of Exercise 18, beginning at the word "*Izoleco*," and continuing to the end of the article.

Digitized by Google

Give definitions and examples of the use of "*ist,*" "*mošt-,*" "*re-,*" "*-uj,*" "*-ul,*" and "*-aĉ.*"

Translate:—To make clean, to become rich, to make large, to make larger, to improve (transitive), and to improve oneself. Every morning I rise at seven. I clean my shoes and make my toilet. I pour out (*elverši*) the water from the jug and take the soap from the dish. When I have finished (my toilet) I put the soap, towel, brush, comb, etc., back into their places. Then I take a walk until it is time to breakfast. At breakfast I take (eat) bread and butter (*buterpano*) with eggs and fruit, and I drink coffee. Afterwards I go by train to the city, where I work in an office until five p.m. Then I am free. I dine at seven and pass (*pasigi*) the remainder of the evening according to will (*laŭvole*).

Digitized by Google

LECTURE 19.

There are some useful and short expressions in Esperanto which it is well to commit to memory, such as the following :—

Kia domaĝo ! or *Kiel domaĝe !* What a pity !
Jam de longe, For a long time past.
Kiel eble plej (as possibly most) *rapide*, As quickly as possible ;
Kiel eble plej baldaŭ, As soon as possible ;
Kiel eble plej bone, As well as possible ;
Kiel eble plej agrable, As agreeably as possible ; and so on.
Ĭom post iom, Little by little.
Tagon post tago, Day by day.
Per malmultaj vortoj, In a few words.
Unuvorte, In one word, in a word.
Post malmultaj tagoj, } In a few days.
Post kelkaj tagoj, }
Alivorte, In other words.
Aliloke, In other place, elsewhere.
Aliflanke, On the other hand, on the other side.
Miaflanke, On my side, for my part.
Miaopinie, In my opinion.
Tutkore, Cordially, whole-heartedly.
Ĝis revido, ĝis la revido, Until we meet again, *au revoir.*
Mano en mano, Hand in hand.
Koro ĉe koro, Heart to heart.
Kiel ekzemple, As for example.

Digitized by Google

Kio ajn okazos, Whatever happens.
Mi soifas, I am thirsty.
Mi estas malsata, I am hungry.
Estas vere, It is true.
Kioma horo estas? What time is it?
Kian aĝon vi havas? / *Kiomjara vi estas?* How old are you?
Mi havas dekkvin jarojn, / *Mi estas dekkvin-jara,* I am fifteen.
Antaŭ unu monato, A month ago.
Tiom pli bone, So much the better.
Kia estas la vetero? What is the weather like? what sort of weather is it?
Via sincere, Yours sincerely.
Via fidele, Yours faithfully.
Mi kredas, ke jes, / *Mi kredas tion,* I believe so.
Ne estas eble, It is not possible.
Kio estas? / *Kio okazis?* What is it? What has happened?
Estas nenio, It is nothing.
Estas negrave, It does not matter.
Kion vi volas diri? What do you wish to say? What do you mean?
Kiun daton ni havas hodiaŭ? What date is it?
Bonvolu silenti, skribi, Kindly be silent, kindly write, etc.
Trankviliĝu! Be tranquil, do not be anxious! Never mind!
Sidiĝu, mi petas, Be seated, please.
Mil dankojn! A thousand thanks!
La vetero estas tre ŝanĝiĝema, The weather is very changeable.
Siavice, In (his) turn.

Having acquired these, the student will have a good basis for either conversation or correspondence.

Digitized by Google

Here are one or two examples of how to commence a correspondence :—

1.

Estimata samideano (*fellow-thinker, literally, partisan of the same idea*),

Vidinte vian peton en "....." pri la korespondado, mi estus tre kontenta interŝanĝi poŝtkartojn kun vi. Bonvolu skribi al mi, ĉu vi preferas kartojn kun vidaĵoj de pitoreskaj (picturesque) lokoj, kun kopioj de famaj pentraĵoj aŭ kun diversaj bildoj. Mi estas preta sendi ian karton, kian vi volas.

Atendante vian respondon, kun kora samideana saluto,

Mi restas, via fidele,

2.

Kara Sinjoro,

Mi vidis vian adreson en "Lingvo Internacia" (!) kaj kompreninte, ke vi volas korespondadi kun angla instruisto, mi respondas ke mi mem estas instruisto en duagrada lernejo, kaj ke mi deziras interŝanĝi opiniojn pri la pli alta instruado de infanoj. Se vi konsentas, bonvole sciigu al mi, kiajn temojn vi preferas, kaj ĉu vi plivolas la leteran korespondadon.

Via samideane,

VOCABULARY.

artisto, artist.
botiaĉoj, bootlaces.
celo, object, aim, goal.
dank' al, thanks to.
ekskurso, excursion.
freneza, mad, *frenzied.*
harmonio, harmony.
impresi, to impress.
jen...jen, sometimes ... sometimes, now ..:now.
kelnero, waiter.
kongreso, congress.
konstati, to verify, to attest, to form an opinion after investigation.
lago, lake, *lagoon.*
magia, magic.
mizera, miserable.
momento, moment.

Digitized by Google

ofte, often.
organizi, to organise.
paro, pair.
pejzaĝo, landscape.
premi, to press.
prezidanto, president.
rondo, round, circle.
saluto, salutation.
sekretario, secretary.
servisto, servant.
simpatio, sympathy.
studi, to make a study of.
ŝanceliĝi, to hesitate (I).
trotuaro, the pavement, sidewalk.
valo, valley.

It is now well known that the Esperantists meet in congress every year in some different country, partly to discuss all questions relating to the progress of the cause and to technical and other matters appertaining to the language; but mainly for the purposes of propagating the use of the auxiliary tongue, arousing enthusiasm and love for the "internal idea," and of fostering among its adherents that international spirit which can only be realised to its full extent at such a congress. The practice gained is of course not to be equalled elsewhere, for one not only talks Esperanto all day and half the night, but one has the opportunity of hearing speakers of all nations, and those who have by common consent been proclaimed our guides for style and fluency. As for the fraternity and joy of these meetings, they must be experienced in order to be understood. They are something too deep for description. The first Congress occurred in Boulogne, and was due to the initiative of a few French "samideanoj," and the hard work and zeal of one man in particular, a lawyer of that town. The name of M. Michaux will always be associated with this first and not-to-be-forgotten Congress. The second took place at Geneva, and there, for a year, with unfaltering enthusiasm, a Protestant minister, Pastro Schneeberger, and a young student, Edmond Privat, worked for its success. The third Congress was in England, and for its unparalleled achievements we had to thank Colonel Pollen, Dr. Cunningham,

Digitized by Google

and Mr. Mudie. They created the now famous phrase "*La trio por la tria*"; and at this Congress it was decided that at least *four* organisers would be required for the fourth Congress, to take place in Dresden. "*La kvaro por la kvara*" consisted of Sinjorino Marie Hankel, Doktoro Mybs, Doktoro Schramm, and Doktoro Arnhold.

Esperantists invariably find that a visit to one Congress makes a *second* an irresistible temptation, and all students of Esperanto are advised to consider the question of a summer holiday to be spent in this way. It may be a little costly, but on the other hand it is an inestimable pleasure, and a certain education in the latest and best means of travel and in the customs of other peoples.

Mr. H. Bolingbroke Mudie, who contributes the following article, knows all about these occasions, for not only has he been present at every one, but he certainly took the most active part in the preparations for the third, and conducted, most successfully, a tour to the fourth.

EXERCISE 19.

ESPERANTISTA KONGRESO!

La kongreso! Kiom da feliĉaj memoroj tiu vorto ekvekas! Ĉiuj fidelaj Esperantistoj deziras fari almenaŭ unu grandan ekskurson alilanden, kaj viziti Esperantolandon, tiun mirindan landon de amikeco, fervoro kaj simpatia sindono.

Unu el la multaj celoj de nia lingvo, kaj certe ne la malplej grava, estas la pligrandigo de intergenta harmonio.

Koni estas ami.

Ĉiuj Esperantistoj, do, ekkonu iom pri la kunfratoj, kiuj deziras tiel korege akcepti vin, en landoj, kie, sen la magia vorto "Esperanto" fremduloj estas ja fremduloj.

Digitized by Google

Nia kongreso estas nia plej granda ĉiujara festo, kaj efektive ĝi jam fariĝis vasta familia rondo. Internaciaj amikoj sin interrenkontas jaron post jaro, jen en Francujo; jen Svisujo; jen Anglujo; jen Germanujo.

En la unua horo—la malluma unua horo pri kiu nur malmultaj nun memoras—neniu volis ekvidi Esperantistojn. Ni estis kvazaŭ frenezuloj. Sed nuntempe, la tuta mondo interbatalas por la honoro akcepti nin kaj nian kongreson. Ĉu la kvina okazos en Hispanujo, Svedujo, Belgujo, aŭ eĉ en Unuigitaj Ŝtatoj, tion ni ne ankoraŭ scias. La Kongresanoj devas tion decidi, sed kie ajn ĝi okazu, ni povas resti certaj, ke en ĉiuj tiuj diversaj landoj loĝas multaj, multaj samideanoj, kiuj senpacience atendas la momenton, kiam ili povos komenci la grandan laboron gajigi al siaj eksterlandaj gefratoj mallongan restadon kun si.

Tro ofte, kiam oni vojaĝas, oni estas kvazaŭ besto, oni nur vidas la mirindan pejzaĝon, manĝas laŭ la Franca maniero, kaj renkontas nur aron da tradukistoj, kelneroj kaj servistoj, kies sola celo estas forpreni viajn kelkajn monerojn.

Sed dum Esperanta vojaĝo, ĉio ŝanĝiĝas. Oni eniras en la vivon mem de la lando, kaj je la forirmomento, oni ne nur bedaŭras forlasi la montojn kaj valojn, riverojn kaj lagojn; sed oni eĉ plie bedaŭras la longan intertempon, kiu devos pasi antaŭ ol oni povos denove premi la manon de tiom da novaj amikoj.

Persone, mi estas feliĉulo, ĉar krom oftaj privataj vojaĝoj, mi povis ĉeesti ĉiujn kongresojn.

Malfacile estus priskribi unu aferon, kiu kontentigis aŭ impresis min pli ol la ceteraj; sed unu el la plej feliĉaj momentoj estis post la tria kongreso en Cambridge—kies Organiza Sekretario kaj Vicprezidanto mi estis. Je la fino de tiu granda festo, multaj transmaraj Esperantistoj venis al mi kaj diris, ke ili

Digitized by Google

nur ŝanceliĝe alveturis Anglujon, ĉar ili timis, ke la Angloj estas tre malĝentilaj kaj nesimpatiaj personoj. Sed, post tiu memorinda restado en Anglujo, sub la ombro de la verda standardo kaj la "Union Jack," ili ĉiuj konstatis, ke la Angloj estas ĉarma popolo, kiun ili esperas reviziti baldaŭ.

Tiel mi sciis, ke la ĉefa celo de Esperanto plenumiĝis, kaj ke dank' al nia lingvo, la homoj pli bone komprenas la homojn.

Verkita por "The Esperanto Manual" de
H. BOLINGBROKE MUDIE.

London, July, 1908.

Respondu al la demandoj:—

Ĉu vi volas korespondadi kun alilanda Esperantisto?
Ĉu vi jam korespondadas kun iu Esperanto?
Ĉu vi preferus Francan korespondanton?
Pri kiu temo vi volus korespondadi?
Ĉu vi iam renkontis alilandan Esperantiston?
Kiom da kongresoj jam okazis?
Kie okazis la lasta?
Kiom da personoj organizis ĝin?
Ĉu vi povas nomi ilin?
Kiom da personoj organizis la trian?
Kiu diris, ke li estas feliĉulo?
Kial li kredas tion?
Ĉu vi intencas viziti la proksiman kongreson?
Ĉu vi scias, kie okazos la proksima kongreso?
Kion ĉiu Esperantisto volas fari?
Kio estas unu el la celoj de nia lingvo?
Kion Esperanto faras el la fremduloj?
Ĉu fremduloj plu ekzistas en Esperantolando?
Kion oni opiniis pri ni en la unuaj tagoj?
Ĉu oni nun opinias tion?
Kion oni akre bedaŭras post kongresa ĉeesto?
Kie Sinjoro Mudie laboris longe?
Kion li sukcesigis?
Kio estis unu el la rezultatoj de la Angla Kongreso?

Digitized by Google

HOME LESSON 19.

Review lecture and learn vocabulary.

Write an answer to the specimen letters opening a correspondence.

Translate: — How do you make bread? He does his lesson anyhow. In every way a little study improves the memory. He drew crayon pictures on the pavement, and thus he gained a few coins. But in no way had he lost the sense of humour. I well remember one of his designs. It was a laughable picture of a miserable woman and her son, who stood in the road. The woman was selling bootlaces, and the boy seemed about to whistle. But the artist had written beneath the pair the words: "Stop whistlin'; folks (*la homoj*) will think you are happy."

Learn by heart one of the anecdotes which you have had corrected in a previous home lesson.

Digitized by Google

LECTURE 20.

For the student of Esperanto there are a hundred reminders of the fact that, at heart and in brain, all men are fundamentally alike, and one of the most noteworthy of these, for mankind generally, is a proverb.

Proverbs, which seem so aptly to point a moral lesson in a few words, and which often seem to be part of the life of some particular nation, are, in reality, quite cosmopolitan, and they appeal to us at once in their Esperanto wording as one of those evident touches of nature which "make the whole world kin."

In many magazines may be read collections of such wise sayings, and they are sometimes headed "Spanish," sometimes "Italian," sometimes "German," or other "Proverbs," but in all cases they might just as well be named "English." In the large collection from which the following few specimens have been taken, and which has been compiled by a brother of Dr. Zamenhof, there are very few indeed which do not ring familiarly in English ears, although in some cases a shade of meaning appears to have been sacrificed in order that the phrases might rhyme. And it is really marvellous that the author has so often hit upon a rhyming word which is exactly to the point.

PROVERBOJ.

Kontentigi ĉiujn eĉ anĝelo ne povas.

Se ĉiu balaos antaŭ sia pordo, tiam en la tuta urbo estos ordo.

Ĉiu kreas sian forton, ĉiu forĝas sian sorton.

Vivu, progresu, sed lerni ne ĉesu.

Por sperto kaj lerno, ne sufiĉas eterno.

Digitized by Google

Ne ĉiam daŭras malbona vetero, ne ĉiam daŭras homa sufero.

Kiu panon donas, malsaton ne konas.
Kiu amas la liton, ne akiros profiton.
Kion oni volas, tion oni povas.
Vortojn ŝparu, agojn faru.

El "Proverbaro Esperanta" de M. F. ZAMENHOF.

VOCABULARY.

absolute, absolutely.
Afriko, Africa.
aserti, to assert.
balai, to sweep.
bombo, bomb.
centra, central.
cerbo, brain, *cerebral.*
certigi, to assure.
civilizi, to civilise.
devo, duty.
dinamito, dynamite.
disputi, to dispute.
ekstremaĵo, extremity, end.
entuziasmo, enthusiasm.
evidenta, evident.
Ezopo, Æsop.
forĝi, to forge.
fripono, rascal.
froti, to rub.
globo, globe.
himno, hymn.
insulo, island.
inteligenta, intelligent.
jurnalo, newspaper, *journal*
kadukiĝi, to decay (I).
kaŭzo, cause.
klera, enlightened.
konkurado, competition.
konstanta, constant.
krimo, crime.
kulpa, guilty, *culprit.*
lango, tongue, *lingual.*
materia (adj.), material.
materio, matter.
mistero, mystery.
moralo, morals.
multobligi, to multiply.
Oceanio, Oceania.
oficiala, official.
ordo, order (neatness).
pacifisto, paxist, pacifist.
pinto, point, pinnacle.
politiko, politics.
ponto, bridge.
preskaŭ, almost.
profito, profit, advantage.
resumi, to sum up, *résumé.*
senpartia, impartial.
sorto, fate, lot.
sovaĝa, wild, savage.
spekulacio, speculation.
sperto, experience.
ŝajni, to seem (I).
trakti, to treat, relate.
troigi, to exaggerate.

Digitized by Google

M. Gaston Moch, who has kindly written "Por kaj Kontraŭ," is the founder and president of the Esperantist Society of Peace, which publishes the Review, "Espero Pacifista," and the collection of "Peace" Works, "Libraro Pacifisma." It is warmly recommended that Esperantists join that society, the address of which is 26, Rue de Chartres, Neuilly-sur-Seine, France.

Exercise 20.

Por kaj Kontraŭ.

Oni ofte asertas, ke Esperanto estas, per si mem, pacigilo inter la homoj, ke:

"Komprenante unu la alian,
La popoloj faros en konsento
Unu grandan rondon familian."

Ĉu ne ŝajnas al vi, ke tiu opinio, kvankam esprimita de nia majstro mem, kaj akceptita de la Esperantistoj tiel entuziasme, ke ili uzas ĝin kiel oficialan himnon, kantatan en ĉiuj festaj kunvenoj, ĉu ne ŝajnas al vi, ke ĝi estas tute malprava?...

(*Ĉi tie la leganto frotas siajn okulojn kaj demandas sin, ĉu vere li legas artikolon verkitan de Esperantista-pacifisto por Esperantista libro*).

Ne miregu tiel. Mi daŭrigas, kaj klarigos mian diron.

Supozu, mi petas, ke mi renkontas sur la strato Ĥinon, kiu scias nur sian lingvon, kiu estas por mi absoluta mistero. La afero estos tute simpla: mi diros nenion al li, nek li al mi.

Kaj, tiamaniere, estas certe, ke ni ne interdisputos. Se, kontraŭe, tiu Ĥino scias mian lingvon, aŭ mi la lian, aŭ se ni ambaŭ scias trian, ni povos alparoli unu alian kaj ion intertrakti. Kaj tiam komenciĝos la malfacilaĵoj. Ĉar kiam du homoj renkontas unu

Digitized by Google

alian, la supozebleco, ke ili interkonsentos pri ia afero, estas kvazaŭ nenia. Estas do preskaŭ certe, ke ni malkonsentos, interdiskutos, interdisputos, malpaciĝos, kaj iros eble ĝis proceso, aŭ insulto kaj batalo. Kiom pli bona estis nia antaŭa "sankta nescio!"

Do, oni faras malbonan servon al ni, proponante interkomprenilon, kiu estas evidenta kaŭzo de malpaco.

(*La leganto daŭrigas froti siajn okulojn, eble ankaŭ sian nazon*).

Ne, mi certigas vin, mi ne troigas. Rigardu ĉirkaŭ vi. Ĉu, en via lando la loĝantoj ne uzas unu saman komunan lingvon? Ĉu pro ĝi, ili vivas "en sankta harmonio" kaj faras "grandan rondon familian?" Ĉu, kontraŭe, ili ne interdisputas akre pro ĉiuj imageblaj materiaj kaj moralaj interesoj, pro negoca konkurado, spekulacio, salajro, religio, politiko; pro la demando, ĉu oni devas malfermi la ovojn ĉe la dika aŭ la pinta ekstremaĵo? Ĉu tio ne montras, ke la posedo de komuna lingvo estas malbono, malfeliĉo, kaj ke la plej rekomendinda rilato inter homoj estas tiu, kiu ekzistas, aŭ pli ĝuste, ne ekzistas, inter sovaĝulo de Centra Afriko kaj alia, kiu vivas, nekonata de li, en iu Oceania Insulo?

(*La leganto... Vidu pli supre*).

Nu, trankviliĝu, mi konfesas, ke mi ŝercis. Oni povas diri pri la lingvo la samon, kion diris iam Ezopo pri la lango; ĝi estas samtempe la plej bona kaj la plej malbona afero sur la terglobo. Same estas pri ĉiuj imageblaj progresoj faritaj de la homaro; ĉiuj povas esti uzataj por malbonaj celoj, same kiel por bonaj. Okazas, ke krimulo mortigas per tranĉilo aŭ bombo; ke malesperanto sin ĵetas de ponto en riveron; ke vagonaro ebligas la forkuron de fripono; ke libroj aŭ ĵurnaloj estas presataj por malnobla celo; sed neniu opinias, ke tranĉiloj, dinamito, pontoj, fervojoj, kaj presiloj estas malbonaj, malpermesindaj objektoj;

Digitized by Google

ili estas "objektoj," t.e., io senpartia, senkulpa, ne responda pri la uzo, kiun la homoj faras el ili. Oni povas nur diri, ke ili multobligas la valoron de la homoj, kiuj ilin uzas.

Simile, internacia lingvo multobligas la (bonan aŭ malbonan) valoron de la homoj, kiuj ĝin praktikas. Malsprituloj uzos ĝin ne inteligente, kaj sukcesos nur montri sian malsaĝecon al pli multaj homoj; malbonuloj fariĝos per ĝi pli danĝeraj; sed kleruloj, dank' al ĝi, progresigos pli rapide kaj efike la civilizon; kaj bonuloj pligrandigos sian bonfaran agadon.

Resume, nek Esperanto, nek ia ajn kreitaĵo de la homa cerbo estas bono aŭ malbono per si mem. Kiom valoras la homo kiu ilin uzas, tiom ili mem valoras. La devo de la plej progresintaj homoj estas do klerigi kaj plibonigi senlace la ceterajn, por ke tiuj admirindaj akiraĵoj estu uzataj por la komuna bono, por la konstanta plialtigo de la morala kaj materia bonstato de la homaro.

Verkita por "The Esperanto Manual" de
GASTON MOCH
(*Membro kaj Akademiano de la Lingva Komitato*).
Julio, 1908, *Neuilly-sur-Seine, France.*

ANEKDOTO.

La juna oficeja knabo deziris pligrandigitan salajron, kaj post longa pripensado, li decidis peti ĝin de la estro mem.

Iom timeme li eniris en la privatan oficejon kaj atendis.

"Nu," demandis la mastro, "kion vi volas?" kaj aŭdinte, li daŭrigis: "Kiom longe vi laboris tie ĉi?"

"Du jarojn."

"Kiom oni pagas al vi?"

"Ok ŝilingojn ĉiusemajne."

"Kian aĝon vi havas?"

"Mi havas dekkvin jarojn."

Digitized by Google

"Nu, kiam mi havis vian aĝon, mi ricevis nur kvin ŝilingojn, kaj opiniis ke mi estas bone rekompencita."

"Ĕble, sinjoro," la junulo respondis, per respektplena voĉo, "vi ne estis tia inda knabo, kia mi estas."

Nenecese estas diri, ke li ricevis la deziritan sumon.

Repeat anecdotes learned for last home lesson. (Teacher will encourage, and correct, where necessary, the attempt of each student).

Respondu :—

Kiu volis pligrandigitan salajron ?
Kien la knabo iris ?
Kiun li vidis ?
Kion li petis ?
Ĉu li estis timema ?
Kian aĝon li havis ?
Kiom li ricevis ĉiusemajne ?
Kiom ricevis la estro, kiam li estis dekkvinjara ?
Ĉu la knabo bone respondis ?
Kion li diris ?
Ĉu la respondo malplaĉis la estron ?

Home Lesson 20.

Learn by heart the proverbs in this lesson.

Read aloud the article by M. Gaston Moch.

Translate into English the anecdote following this article.

Translate :—The song of the birds and the noise of the brook gladden our hearts on this sweet spring morning. Youth is the morning or springtime of life. In middle age we have the strength of summer, and, later on, the ripeness of autumn and the decay of winter. But these are only the changes of the body, for the soul is immortal and cannot die. Let us then take care that in each season of life the light of the soul remain clear and strong.

Digitized by Google

LECTURE 21.

All Esperantists are advised to join, if possible, the local group or club. Here they will meet fellow-thinkers, who will be pleased indeed to welcome them and to give them all suitable practice. At the group meetings, generally held weekly or fortnightly, they will have opportunities of hearing more or less fluent speakers, and of practising actual conversation, for in nearly all groups the business of the meeting and most of the conversation are entirely conducted in Esperanto. Here, too, the student will have a means of communication with the Esperanto movement all over the world, for the group is usually the local centre of information.

As to what occurs at the group-meetings, this is always more or less varied, but usually some little business is done on each occasion, the minutes of the past meeting are read, and then follows the telling of anecdotes, or reading of papers on special subjects, or even animated and vigorous debates may take place. When the group has access to a piano, of course part of the evening is spent in singing, for many beautiful poems, both original and translated, have been set to music. Generally plenty of time is allowed, too, for opportunities of friendly conversation.

Debates on philosophical subjects are, generally, not a success, *as debates*, because of the startling similarity of the opinions of most of the members. Indeed it is a very noteworthy fact that Esperantists generally are a class of people who, at heart, are unanimous in most of the things in life which count. Of course, among them there is a large sprinkling of what the world calls "cranks," that is to say, of paxists, socialists, vegetarians, and others. But it must be what Dr. Zamenhof has called "the internal idea"

Digitized by Google

which draws to its standard the men of broad mind and large heart who constitute the bulk of its followers. Be that as it may, the teacher of Esperanto hears almost daily expressions of opinion from past students and other friends of the movement, which claim not only that Esperanto is to them a fascinating hobby or a source of profit and pleasure, but that in Esperanto is found something nowhere else to be obtained; something that makes Esperanto friends the tried friends and the true friends, and that makes Esperanto companions seem the brightest, the kindest, and the most intelligent on earth. A Frenchman once said to the writer "The present Esperantists are the élite of the world," and those who would question the truth of this remark are advised to investigate the matter for themselves.

VOCABULARY.

aliproksimiĝi, to approach (I).
aŭskulti, to listen.
bruna, brown.
efekto, effect.
efiko, effect, efficacy.
egoista, egoistic.
enamiĝi, to fall in love (I).
envii, to envy.
eterna, eternal.
fabelo, fable.
fidi, to have faith in, to trust
flava, yellow.
flirti, to flit, to flirt (I).
ĝui, to enjoy.
himero, a chimera.
kompensi, to compensate.
kurso, course (of lessons, etc.).
leĝo, law.
majesta, majestic.
manpremo, handshake.
menso, mind.
muziko, music.
nenliĝi, to disappear, to become nothing (I).
Nordo, North.
nubo, cloud.
papilio, butterfly.
plano, plan.
poezio, poetry.
purpura, purple.
regi, to rule.
rozkolora, pink.
seka, dry.
Sudo, South.
teruro, terror.
vidpunkto, point of view.

Digitized by Google

The following article and verses were read at a meeting of the Liverpool Esperanto Group in June, 1908, when each of the members contributed his or her opinion.

Exercise 21.

La Feliĉeco.

La feliĉeco! Kio kaj kie ĝi estas? Ne estas facile respondi tiajn demandojn per malmultaj vortoj, ĉar la respondo tro ofte dependas nur de la vidpunkto de la respondantò. Unuj ŝajnas esti feliĉaj ĉiam, aliaj, neniam. Por kèlkaj personoj, la feliĉeco estas kiel papilio kiu ĉiam flirtas antaŭe sed neniam estas kaptata. Jen ĝi ŝajnas esti vivanta, daŭranta afero, jen nur ĥimero kiu neniiĝas, kiam oni alproksimiĝas. Sed antaŭ ol diri ĝuste *kio*, laŭ mia opinió, estas la feliĉeco, mi diros kie ĝi estas. Tie, ĝuste kie *vi* estas; en la domo, kaj ekstere; sur la tero; en la aero, unuvorte, ĉie. Kial vi ne trovis ĝin antaŭe? tial ke vi tro ofte serĉis ĝin malproksime, dum la feliĉoj, simplaj sed sufiĉegaj, vere estas ĉiam ĉe ni.

Oni povas esti feliĉa multmaniere, sed pro la homa pekado, neniam *perfekte* feliĉa. Nur la senpekaj liberigitaj animoj povas esti tiel feliĉaj, ke ekzistas por ili nenia maldolĉaĵo. Kredeble ĉiuj konsentos ke la plej sankta feliĉo estas tiu de la patrino. Ŝia feliĉeco estas grandega kaj bela, ĉar ordinare ĝi estas tute ne egoista; sed ŝi havas samtempe multajn zorgojn, multajn antaŭsentojn, multajn timojn pri la estonteco de la infanoj. Eble la plej pura estas tiu de la religiulo, sed se li ne estas samtempe tutè *homa*, lia feliĉeco estas malvarma kaj neplena. Kompreneble la amantoj pretendas, ke ilia feliĉeco estas nesuperebla, sed eĉ se oni konsentas, oni ankaŭ scias, ke tre ofte ĝi estas nedaŭra.

Nu, por esti vere feliĉa, kaj dum la suna tempo de la vivo, kaj dum la ventegoj, estas necese kompreni kvar aferojn, kiuj estas:—

Digitized by Google

1. La kompensado, aŭ la leĝo de la kaŭzo kaj la efekto.
2. La eterneco de la vivo, kaj la progreso de la animo.
3. La senlimeco de Dio.
4. Ni mem, kaj la sinregado.

Komprenante tiujn ĉi, ni scias la feliĉecon. Ni komprenas, ke tio, kion ni ĝuas, estas la natura kompenso de nia agado, ie kaj iam; ke tio, kion ni suferas, estas la necesega kaj neevitebla, natura rekompenco de niaj eraroj, ie kaj iam. Ni scias, ke kvankam nuntempe ni eble povas vidi nur la nubojn, ian tagon ni vidos, des pli bone pro la nuboj pasintaj, la gloran sunlumon de Dio. Ni komprenas, ke kvankam la korpo mortas, la animo pasas antaŭen por vivi pli larĝe kaj bone. Ni povas kuraĝe renkonti la plej terurplenan okazon, se nur ni memoras, ke ni mem eterne ekzistos. Ni povas eĉ vidi la nekuraceblajn malsanojn de aliuloj sen tiom da doloro, kiam ni kredas, ke por ili atendas pligrandigita ĝojo en la estonteco. Ni povas trankvile vidi la mortiĝon de la dolĉaj infanoj, sciante, ke ili saviĝas el pekoplena homa vivo. Ni povas adiaŭi niajn plej-amatajn, fidante, ke ni sekvos ilin baldaŭe. Kiam ni povas vidi Dion en ĉio, ni iom post iom komprenas, ke *ni* ankaŭ enhavas Lin, kaj memorante tion, ni penos agi, kiel Li volas, precipe al niaj proksimuloj. Tiam la blua ĉielo, la verdaj kampoj, la majestaj montoj, kaj la granda maro; la kortuŝanta muziko, la dolĉaj poezioj, la sento pri devoj plenumitaj; la rideto de infano, la manpremo de amiko; ĉiuj, tiuj ĉi estas pli belaj, pli feliĉigaj, ĉar en ili ni vidas Dion. Komprenante nin mem kaj bone regante *nin*, ni ne povas timi ian ajn alian mastron.

Tiam por ni malfermiĝas tute nova mondo, belega, pacega; tiam povas esti, ke ni rigardos la vivon kvazaŭ—mortinte—ni rigardus ĝin de ekstere, kaj

Digitized by Google

ekkomprenus la volon de tiu Ĉiopovulo, kiu kreis por nia plezuro, kaj kiel nian lernejon, la mirindan mondon, en kiu ni loĝas.

Kie estas la ĝojo ?
Jen, diris infano,
Jen estas la vojo—
Nur vivu kaj ludu
Kun la infanaro,
Jen estas la ĝojo !

Kie estas la ĝojo ?
Ha ! diris patrino,
Jen estas la vojo !—
Min vidu—enviu—,
Kun dolĉa idaro,
Jen estas la ĝojo !

Kie estas la ĝojo ?
Oh ! diris amanto,
Jen estas la vojo !
Nur enamegiĝu,
Kun belamatino—
Jen estas la ĝojo !

Kie estas la ĝojo ?
Respondis lernulo,
Jen estas la vojo !—
Kun vera fervoro
Nur legu kaj lernu,
Jen estas la ĝojo !

Ĉu vere la ĝojo
Sin trovas en vojo
De gajaj infanoj,
De zorgaj gepatroj !
De amaj amatoj,
Aŭ lertaj lernantoj ?

Digitized by Google

Ha ne ! baldaŭ venos
Doloro, infanoj !
Maldanko kompensos
Vin, karaj gepatroj !
Malofte fidelaj
Pruviĝas amatoj,
Kaj sekaj, malbelaj
Troviĝas lernatoj.

Ho ! homoj eraraj
Vi estas malpravaj
Fidante, sur tero
Ekzistas afero
Kie estas la ĝojo
Sed vivo ĉiela
Ne estas fabela ;
Kaj laŭ veraj pensoj
De plej noblaj mensoj
Tie estas la vojo

Do, amo kaj scio
Ne estas la vojo :
Kunagu kun Dio—
Jen estas la ĝojo.

Originale verkita de MARGARET L JONES.
Liverpool, June, 1908.

Repeat the proverbs learned.

Respondu :—

Kion vi ĵus fermis ?
Kion ni malfermis kiam ni komencis la lecionon ?
Sur kion vi sidiĝis, enirinte la ĉambron ?
Kiu nun sidas ?
Kiu nun staras ?
Kie estas viaj libroj ?
Kion mi nun faras ?
Kiu aŭskultas, dum vi parolas ?
Kiu aŭskultas, kiam mi parolas ?
Kiom da personoj nun ĉeestas ?

Digitized by Google

Kiom da Esperantaj lecionoj vi jam ricevis ?
Kioma horo estas nun ?
Je kioma horo ni kunvenis ?
Je kioma horo ni disiĝos ?
Kien vi iros post la disiĝo ?
Ĉu vi ĉeestadas aliajn lingvajn kursojn ?
Ĉu vi intencas ĉeesti la proksiman kongreson ?
Ĉu vi iam vojaĝis alilanden ?
Ĉu vi povas paroli france ?
Ĉu vi intencas ekzameniĝi je la fino de la kurso ?
Kiu unue parolis al vi pri Esperanto ?
Kiajn librojn vi plej ŝatas ?
Ĉu vi amas la poezion ?
Ĉu vi amas la muzikon ?
Kiu staras inter vi kaj la nigra tabulo ?
Per kio oni skribas sur la tabulo ?
Per kio vi skribas viajn lecionojn ?
El la tabulo kaj la pordo, kiu staras pli alte ?
Ĉu, se vi starus sur seĝo, vi povus tuŝi la supron de la pordo ?
Ĉu vi povus tuŝi la plafonon ?
El kio estas farita la planko ?
El kio estas faritaj viaj libroj ?
Kia estas la koloro de la muroj ?
Kiajn kolorojn vi plej ŝatas ?

HOME LESSON 21.

Read through lecture and exercise.

Learn vocabulary.

Compose a series of five short sentences, using in turn every form of the word "ia," and similarly with the word "ial."

Write an essay of not less than a hundred words on any subject you like, taking care that your Esperanto phraseology be simple and clear. (The student is advised *not* to write the essay first in English, but to attempt to put his thoughts directly into Esperanto).

Digitized by Google

LECTURE 22.

La Poezio.

Esperanto verses are sometimes very beautiful, but it is necessary for the student to understand something of the rules for verse-making in order that he may judge for himself what is good and worthy of note, and what is indifferent, or worse. Some Esperantists have written verses which utterly ignore the laws of rhyme and metre, and which abuse altogether the "poet's license." The result is something which not only offends the ear of the listener, but which often is incomprehensible to the eye of the reader.

Some may think these remarks inappropriate in a course of lessons, but the fact that many pupils of the writer have composed good verses at the end of the usual term, and also that Esperanto itself seems often to inspire a poet, will perhaps justify the few suggestions following:—

1. Unless you are *inclined* to writing verse, do not attempt an Esperanto poem.

2. Always remember that, whatever you write, the accent *must* fall on the last but one syllable of all words.

3. If your verses are intended to rhyme, be sure that you select rhyming words.

4. Remember that harmony is essential.

5. Note that although inversion of the order of words is permissible, it is *not* a good thing to abuse this permission. *Try* to write as clearly as in prose. The exigencies of rhyme and accent, however, in Esperanto, and the absence of many monosyllables, perhaps rather more than in English, sometimes

Digitized by Google

postulate inversion. But the accusative inflexion is a great help to clearness in such cases.

6. When reading poetry, accustom yourself to the fact that the *object* of the sentence may be presented as the first word. This will save you much puzzling.

Dr. Zamenhof's poems, of which the first following, "La Vojo," is a fine specimen, may be taken as a safe guide.

ELISION.

Elision in Esperanto, except in poetry, is not common, nor to be recommended.

As we have read in one of the exercises, the "a" of the article "*la*" may be omitted when the article follows a preposition ending with a vowel. It may also occasionally be omitted before a vowel, as in "L' espero, l' obstino."

In verses, the "*o*" of nouns (and *not* the "*oj*," nor the "*on*") may be omitted when necessary to drop a syllable.

(As already seen, "*dank' al*," though it is something of an exception, is often used for the expression "Thanks to.")

An apostrophe must always be used to show elision.

VOCABULARY.

abrikoto, apricot.
admoni, to admonish.
ananaso, pineapple.
angilo, eel.
asparago, asparagus.
avelo, hazel nut.
banano, banana.
biero, beer.
bori, to bore.
brasiko, cabbage.
bulbo, onion.
cejano, cornflower.
cidro, cider.
citrono, lemon.
ĉerizo, cherry.
direkto, direction.
dorno, thorn.
elteni, to hold out.
ezoko, pike.
familio, family.
fazeoloj, beans (scarlet runners).

Digitized by Google

figo, fig.
florbrasiko, cauliflower.
frago, strawberry.
frambo, raspberry
frapi, to strike, to knock.
frunto, forehead.
genuo, knee.
geranio, geranium.
gloro, glory, fame.
granito, granite.
grati, to scratch.
guto, a drop.
hardita, hardened.
haringo, herring.
juglando, walnut.
karoto, carrot.
karpo, carp.
kaŝtano, chestnut.
kateno, fetter.
kokoso, cocoanut.
kordo, cord, string (of musical instrument).
kratago, hawthorn.
krizantemo, chrysanthemum.
laktuko, lettuce.
legomo, vegetable.
lekanto, marguerite.
lekanteto, daisy.
leontodo, dandelion.
lilio, lily.
limonado, lemonade.
lonioero, honeysuckle.
melono, melon.
miozoto, forget-me-not.
moko, a mocking.
napo, turnip.
okzalo, sorrel.
olivo, olive.
oranĝo, orange.
ostro, oyster.
palpi, to feel (by touch).
papavo, poppy.
persiko, peach.
piedfingro, toe.
pizoj, peas.
pripensi, to consider.
prosperi, to prosper (I).
provi, to attempt, to try.
pruno, plum.
rafaneto, radish.
rafano, radish (horse).
salmo, salmon.
sardelo, sardine.
sfero, sphere.
signo, a sign.
siringo, lilac.
spinaco, spinach.
spirita, spiritual.
superi, to be superior.
ŝarĝo, load.
terpomo, potato.
timigi, to frighten, *intimidate.*
tomato, tomato.
torso, trunk (of body).
trunko, trunk (of a tree, etc.).
truto, trout.
tulipo, tulip.
veliki, to fade (I).
vinberoj, grapes.
violeto, violet.
violo, pansy.

Digitized by Google

Exercise 22.

LA VOJO.

Tra densa mallumo briletas la celo,
Al kiu kuraĝe ni iras.
Simile al stelo en nokta ĉielo,
Al ni la direkton ĝi diras.
Kaj nin ne timigas la noktaj fantomoj,
Nek batoj de l' sorto, nek mokoj de l' homoj,
Ĉar klara kaj rekta kaj tre difinita
Ĝi estas, la voj' elektita.

Nur rekte, kuraĝe kaj ne flankiĝante
Ni iru la vojon celitan ;
Eĉ guto malgranda, konstante frapante,
Traboras la monton granitan.
L' espero, l' obstino, kaj la *pacienco*—
Jen estas la signoj, per kies potenco
Ni paŝon post paŝo, post longa laboro,
Atingos la celon en gloro.

Ni semas kaj semas, neniam laciĝas,
Pri l' tempoj estontaj pensante.
Cent semoj perdiĝas, mil semoj perdiĝas,—
Ni semas kaj semas konstante.
" Ho, ĉesu ! " mokante la homoj admonas,—
" Ne ĉesu, ne ĉesu ! " en kor' al ni sonas ;
" Obstine antaŭen ! La nepoj vin benos,
Se vi pacience eltenos."

Se longa sekeco aŭ ventoj subitaj
Velkantajn foliojn deŝiras,
Ni dankas la venton, kaj, repurigitaj,
Ni forton pli freŝan akiras.
Ne mortos jam nia bravega anaro,
Ĝin jam ne timigos la vento, nek staro,
Obstine ĝi paŝas, provita, hardita,
Al cel' unu fojon signita !

Nur rekte, kuraĝe kaj ne flankiĝante, k.t.p.

Originale verkita de L. Zamenhof.

Digitized by Google

The following verses, set to the tune of "The March of the Men of Harlech," were written soon after the completion of a first course of lessons.

AL LA ESPERANTISTARO.

Al la Esperantistaro
Tie ĉi kaj trans la maro,
Tiu ĉi ĉeestantaro
Turnas sin kun am'.
Ĝi prosperu ĉiam, ĉie,
Di' permesu, ke ĝi plie
Kresku dum la jaroj ie
Ĝis grandega fam'.

(*Ĥoro*). Inter la nacioj, inter familioj,
Amikecon kaj fratecon faru l' energioj.
Ĝis la homa militado
Kaj ĝisnuna malamado
Sub la lingva instruado
Malaperos jam.

Fama, lerta pacamanto,
Patro ja de Esperanto,
Longe estu kunvivanto,
Zamenhof kun ni.
Tra la mond' la lingvo iros
Kaj pri ĝi la homoj diros:
"Ĝi naciojn ja kuntiros
Per la help' de Di'."

(*Ĥoro*). Inter la nacioj, k.c.

Diru, do, tra l' estonteco,
Al la homoj, kun braveco,
Pri la lingva utileco
Laŭ la homa rond'.

Digitized by Google

Daŭru ni klopodi ĉiam,
Turnu nin de l' cel' neniam,
Ĝis la glora tago, kiam
Aŭdos nin la mond'.

(*Ĥoro*). Inter la nacioj, k.c.

Originale verkita de FRED. J. WEST.

(Mr. West is the energetic and zealous secretary of the St. Helens Esperanto Group, and also of the Federation of the Lancashire and Cheshire Groups).

The following is a translation from the old nursery rhyme :—

"There was a man of our town,
And he was wondrous wise," etc.

INFANA VERSAĴO.

En nia urbo unu hom'
Superis la saĝulojn;
En dornarbeton saltis, kaj
Forgratis li l' okulojn.

Vidante sin senokulul',
Li multe sin kompatis;
Li saltis en *alian*, kaj
L' okulojn re-*en*gratis.

Esperantigita de GABRIEL D. LEWIS.

(Mr. Lewis is a vice-president of the Liverpool Esperanto Group, and one of the Consuls for that city).

LA MORTO.

Ho morto! bela morto!
Sopiras mi al vi.
Pli gajiganta forto
Vi estas ja al mi

Digitized by Google

Ne rompo de la kordo
De l' vivo sur la ter'
Vi estas, sed la pordo
De pli belega sfer'.

Se vivo estas bona,
Ĉar brilas nun la sun'
Dum tago, kaj en nokto
La steloj kaj la lun' ;
Pli bona estas morto,
Ĉar kiu fidas ĝin,
En lumo por eterno
Post tempo trovos sin.

Se estas viv' malgaja
Por tro ŝarĝita kor',
Memoru : post la morto
Ne estos plu dolor' !
Por tiu, kiu amis
Kaj vivis bone, ĝi
Al la venkinto donas
Kompenson de la Di'.

Se homon kaj laboron
Vi amas tie ĉi ;
Pripensu : post la morto
Vi povos pli kaj pli
Labori kaj amegi
Sen ia korpkaten',
Kaj por homaro esti
Spirita, dolĉa ben'.

(*El "Lingvo Internacia."*)
Originale verkita de MARGARET L. JONES.

February, 1908.

(The above may be sung to the tune of "I'll sing thee songs of Araby.")

Translate "La Vojo."
Repeat anecdotes.

Digitized by Google

Respondu :—

Ĉu tio estas libro?
Ĉu tio ĉi estas plumo?
Ĉu la tabulo estas antaŭ mi?
Ĉu mi nun sidiĝas?
Kie vi sidas?
Sur kio vi sidas?
Kien vi metis viajn librojn?
Kion oni metas en la manĝaĵejon?
Kion oni ofte trovas en skatolo?
Kion oni troŷas ofte sur arboj?
Nomu kelkajn fruktojn.
Nomu kelkajn florojn.
Nomu kelkajn manĝaĵojn.
Nomu kelkajn trinkaĵojn.
Nomu kelkajn legomojn.
Nomu kelkajn nuksojn.
Nomu kelkajn fiŝojn.
Nomu kelkajn viandojn.

HOME LESSON 22.

Read remarks and verses in lecture.

Translate:—La homo havas kvin sentojn, kiuj estas: la palpado, la vidado, la flarado, la aŭdado kaj la gustumado. La ĉefaj partoj de la korpo estas la kapo, la torso kaj la membroj.

Name in Esperanto twelve parts of the body.

Compose nine sentences, three containing "*ant*" as a noun, adjective, and adverb respectively, three with "*int*," and three with "*ont*."

Learn vocabulary.

Learn one verse of "La Vojo."

Digitized by Google

LECTURE 23.

Something has been said of "the internal idea" of Esperanto and what it accomplishes, but the following extracts will serve to show a little more, what it *is*. The Esperantists are often blamed for a lack of patriotism, but, as Dr. Zamenhof points out, Esperantists are indeed the *true* patriots. The writer has received the Doctor's permission to republish the following excerpts from his speech delivered at the Guildhall, London, 21st August, 1907, at the close of the Congress visit.

VOCABULARY.

aligluĝi, to adhere (I).
anstataŭi, to replace, to be in place of.
armilo, weapon.
ataki, to attack.
Brita, British.
Ĉefburĝo, Alderman.
demono, demon.
egoismo, egoism.
Esperantismo, Esperantism.
foriasi, to forsake.
gastameco, hospitality.
indigno, indignation.
instigi, to instigate, to urge on.
kruda, crude.
libertempo, holiday.
Litovujo, Lithuania.
lupo, wolf, *lupine.*
moro, custom, habit.
parto, part.
patriotismo, patriotism.
peco, piece.
prepari, to prepare.
rajto, right.
reprezenti, to represent.
revi, to daydream, *reverie* (I).
senco, sense.
sklavo, a slave.
sonĝo, dream.
speco, kind, species.
Ŝovinisto, Chauvinist.
Urbestro, Mayor.

Digitized by Google

Exercise 23.

El la
Parolo de D-ro L. L. Zamenhof
en la Guildhall, Urbo Londono,
la 21an de Augusto, 1907.
Prezidis: Sir T. Vezey Strong, *Ĉefburĝo.*

Estimata Reprezantanto de la Urbo Londono, karaj samideanoj,—Estas al mi tre agrable, ke mi havas nun la okazon saluti la Britan popolon en ĝia granda ĉefurbo. Ni venis el Kembriĝo, kie niaj Britaj samideanoj kun la plej granda laboremeco kaj gastameco preparis por ni belegan feston; ne sole niaj samideanoj, sed ankaŭ la ankoraŭ neesperantigita urbo faris ĉion, kion ili povis, por ke ni, Esperantistoj, elportu el la urbo la plej bonan rememoron. Tial nun miaj unuaj vortoj estas sincera danko por la gastameco, kiun ni ĝuis. Jam la duan fojon ni ĝuas la Britan gastamecon, ĉar certe ja neniu el ni forgesis, kiel amike ni estis akceptitaj en la Britaj urboj Folkestone kaj Dovero antaŭ du jaroj, en la tempo de la Bulonja kongreso....

... La Esperantismo, kiu predikas amon, kaj la patriotismo, kiu ankaŭ predikas amon, neniam povas esti malamikaj inter si. Ĉiu povas paroli al ni pri ĉiuspeca amo, kaj ni kun danko lin aŭskultos; sed kiam pri amo al la patrujo parolas al ni la ŝovinistoj, tiuj reprezentantoj de abomeninda malamo, tiuj mallumaj demonoj, kiuj ne sole inter la landoj, sed ankaŭ en sia propra patrujo konstante instigas homon kontraŭ homo—tiam ni kun la plej granda indigno nin deturnas. Vi, nigraj semantoj de malpaco, parolu nur pri malamo al ĉio, kio ne estas via, parolu pri egoismo, sed neniam uzu la vorton "amo," ĉar en via buŝo la sankta vorto "amo" malpuriĝas.

Vi staras nun antaŭ miaj okuloj, mia kara Litovujo, mia malfeliĉa patrujo, kiun mi neniam povas forgesi,

Digitized by Google

kvankam mi forlasis vin kiel juna knabo. Vi, kiun mi ofte vidas en miaj sonĝoj, vi, kiun nenia alia parto de la tero iam povos anstataŭi en mia koro, vi atestu kiu vin pli multe, pli kore kaj pli sincere amas; ĉu mi, idea esperantisto, kiu revis pri frateco inter ĉiuj viaj loĝantoj, kvankam mi devis bedaŭrinde forlasi vin, simile al multaj centoj da miloj da aliaj viaj filoj—aŭ ĉu tiuj personoj, kiuj deziras, ke vi apartenu nur al ili, kaj ĉiuj aliaj viaj filoj estu rigardataj kiel fremduloj aŭ sklavoj! Ho patriotismo, patriotismo, kiam fine la homoj lernos kompreni ĝuste vian sencon! Kiam via sankta nomo ĉesos esti armilo en la manoj de diversaj malhonestuloj! Kiam fine ĉiu homo ricevos la rajton kaj la eblon algluiĝi per sia tuta koro al tiu peco da tero, kiu lin naskis!

Longe daŭros ankoraŭ malluma nokto sur la tero, sed ne eterne ĝi daŭros. Venos iam la tempo, kiam la homoj ĉesos esti lupoj unuj kontraŭ aliaj. Anstataŭ konstante batali inter si, elŝiri la patrujon unuj al la aliaj, perforte altrudi al si reciproke siajn lingvojn kaj morojn, ili vivos inter si pace kaj frate; en plena interkonsento ili laboros sur la tero, sur kiu ili vivas, kaj kontraŭ tiuj krudaj fortoj de la naturo, kiuj ilin ĉiujn egale atakas. Kaj kune kaj interkonsente ili celados ĉiuj al unu vero, al unu feliĉo. Kaj se iam venos tiu feliĉa tempo, ĝi estos la frukto de konstanta kaj senlaca laborado de tiuj homoj, kiujn ni vidas nun en ĉi tiu ĉambrego kaj kies nomo, ankoraŭ tre malmulte konata kaj tre malmulte ŝatata, estas "Esperantistoj."

The following remarks may be useful to the student:—

"*-ismo*," although not classed among the regular affixes, corresponds to the English suffix "ism" in many words, as Esperantismo, patriotismo, etc.

The English letters "qu" in such words as

Digitized by Google

quantity, quarter, quiet, quality, quarantine, quadrille, quaker, quartz, quid pro quo, quintessence, etc., become "*kv*" in Esperanto, as *kvanto, kvarono, kvadrilo, kvidprokvo, kvintesenco,* k.t.p.

Prepositions combined with intransitive verbs often make the verb transitive, as in *prizorgi,* to care about; *prizorgi tion, eniri la ĉambron, trairi la urbon, pripensi la fakton, ĉirkaŭiri la farmon, ĉeesti la kunvenon,* because the preposition is omitted before the noun.

An Esperanto verb **sometimes** *contains* a preposition, as in *rigardi,* to look *at; pagi,* to pay *for; serĉi,* to look *for; aŭskulti,* to listen *to; utili,* to be useful *to; taŭgi,* to be fit *for,* etc.

Of course, as yet, some printers do not stock the special type necessary for Esperanto. If then something is urgently required to be printed in Esperanto, and there is not time to enlist the services of an Esperanto printer, the sign "ˆ" may be represented by adding the letter "h" to the letter which it usually surmounts; and the sign "˘," according to permission of Dr. Zamenhof, may be omitted altogether.

"El" is sometimes used with a verb to mean "thoroughly," "quite," as *elesplori,* to explore out; *elprovi,* to thoroughly test.

"*La nia, la via,*" etc., are sometimes used instead of the simple "*nia, via,*" etc.

Write from dictation ten lines from the Exercise No. 23.

Respondu :—

Ĉu vi havas multe da mono en via monujo ?
Kiom kostas unu sako da karbo nuntempe ?
Kiom kostis via lernolibro ?
Ĉu vi rapide alrespondas leterojn ?
Ĉu vi konsentas al la proponoj de la nuna Parlamento ?
Ĉu vi iam vidis reĝon ?
Kion vi pensas pri nia nuna reĝino ?

Digitized by Google

Kie vi pasigis vian lastan libertempon ?
Ĉu kiam vi libertempis vi havis bonan veteron ?
Kiom ofte vi libertempas dum la jaro ?
Ĉu vi la lastfojon, renkontis Esperantistojn ?
Nomu anglan monton.
Nomu anglan riveron.
Ĉu vi iam vidis lagon ?
Ĉu vi iam supreniris monton ?
Kiaj partoj de Anglolando estas la plej montecaj ?
En kiu graflando troviĝas la lagoj ?
Ĉu vi korespondadas kun iu per Esperanto ?
Kiu korespondadas Esperante ?
Ĉu vi havas afablan korespondanton ?
Kie estas Parizo ?
Kie estas Londono ?
Nomu la ĉefurbon de Germanlando.
De Franclando. De Ruslando.

Repeat first verse of "La Vojo."

HOME LESSON 23.

Read aloud the speech of Dr. Zamenhof.

Translate:—Ĉu vi enskribis la elspezojn de via lasta libertempo ? Mi deziras ion por envolvi miajn librojn. Kion enhavas la skatolo ? Kio enhavas la skatoleton ? Ne blindê kredu la antaŭsentojn, ĉar estas evidente ke vi ne estas difinita por multaj suferoj. La antaŭjuĝo ofte erarigas la homon. Kelkaj reĝoj estas senkapigitaj. La kunlaborado de diversaj verkistoj, estis ofte tre kontentiga afero por la literaturo. La interparolado de la geamikoj estis malĝentile interrompita de la laŭta ekkrio de la malgranda knabo.

Compose nine sentences as in last lesson, but with the *passive* forms of the participle.

Learn vocabulary.

Learn second verse of "La Vojo."

Compose five short sentences with the aid of the various forms of the word "*iom.*"

Digitized by Google

LECTURE 24.

Now that the course of lessons is almost completed the student will naturally ask "What is the use of Esperanto to me?" This is so important a question that the writer of this work asked the editor of "Esperanto" (a fortnightly newspaper) to kindly reply in an article on the utility of the language. Sinjoro Hodler not only consented, but wrote the article at great length, for, as he says, the subject must not be summarily dismissed. It is hoped that all students will follow the advice he gives, for there is no doubt that it is the best to be obtained on the subject.

VOCABULARY.

afiŝi, to affix a placard, poster, etc.
aktive, actively.
alcentrigi, to concentrate.
asocio, association.
daŭrigota, to be continued.
delegito, delegate.
dungi, to hire (servants), to employ.
ekzemplo, example.
enkenduki, to introduce.
Esperantiano, member of the Universal Esperanto Association.
eventuala, eventual.
fabriki, to manufacture.
generacio, generation.
industrio, industry, trade.
informisto, informer.
insisti, to insist (I).
institucio, institution.
jarlibro, year-book.
k.a., kaj aliaj, and others.
karto, card.
koncerni, to concern.
konkreta, concrete.
konsekvenco, consequence.
konsulo, consul.
konvinki, to convince.
linio, line.
maŝo, a mesh (of a net).
minaci, to threaten, to menace.
Paradizo, Paradise.
partopreni, to take part.
plendi, to complain, *plaintive* (I).
praktika, practical.
preciza, precise.
prezenti, to present.

Digitized by Google

punkto, point.
regulo, rule.
ripozi, to rest, *repose.*
staclo, station.
studento, a student.
superflue, superfluously.
tasko, task.
tondro, thunder.
turismo, touring (in general).
universitato, a university.
urĝa, urgent.
varbi, to enroll, to enlist.
volonte, willingly.

Exercise 24.

Pri la Utileco de Esperanto.

Kiam la lernanto de Esperanto—post la kurso—fariĝis kapabla uzi nian lingvon, stariĝas al li la demando: "Por kio utilas al mi Esperanto?" Se li ne ricevas tujan respondon al tiu demando, eble lia fervoro—kiu estas eco rapide pasema—malvarmiĝos; iom post iom li forlasos niajn vicojn, ĉar lia scio estos sencela. Kontraŭe, se ni povas prezenti al li certajn profitojn, kiujn li tuj povas ricevi per Esperanto, li pli kaj pli interesiĝos al nia afero, pli kaj pli aktive partoprenos en ĝi; ne nur pro entuziasmo, sed pro la profito, ĉu materiala, ĉu idea, kiun li ricevos.

Tiu punkto estas ankoraŭ pli grava, kiam ni turnas nin al homoj praktikaj, kiel ekzemple, al komercistoj, aferistoj, kiuj pro sia okupateco ne volonte ŝatas perdi tempon. Kiam al ili ni parolas pri Esperanto ni ricevas tiun demandon: "Por kio utilus al mi Esperanto?" Se ni ne povas respondi tiun demandon per precizaj faktoj, sed nur per pensoj pri estonteco, nia demandinto estos eble konvinkita pri la eventuala utileco de Esperanto por la estontaj generacioj, sed li nun nek lernos, nek uzos nian lingvon. Tute kontraŭe, se ni citas al li difinitajn utilojn, kiujn li tuj povas ricevi; se plie, ni montras al li, ke eĉ de nun, li, ne lernante Esperanton, povas ĝin uzi kaj praktike sperti, ĉu ĝi al li utilas aŭ ne, estas multe pli certe, ke li tiamaniere facile varbiĝos al nia afero.

Digitized by Google

Ĉu ni ĝis do povas diri, ke Esperanto jam nun estas utila? Por respondi per faktoj tiun demandon, kreiĝis en la Esperantistaro vasta organizaĵo, sub la nomo "*Universala Esperanto Asocio,*" kiu celas la enkondukon de Esperanto en la praktikan vivon kaj la plifaciligon de la ĉiuspecaj rilatoj inter diverslingvanoj per Esperanto. Kelkaj vortoj pri la organizo de tiu Asocio tuj komprenigos ĝian utilecon; en ĉiu loko, kie tio estas ebla, ekzistas Delegito, helpata de diversaj kunlaborantoj, nomataj konsuloj, informistoj, k.t.p. Tiuj personoj havas la devon utili kaj helpi ĉiamaniere al la aĵoj de Universala Esperanto Asocio (aŭ, mallongige, Esperantianoj), kiuj petos de ili informojn pri la loka komerco, industrio, turismo, institucioj, k.t.p.

Mi donu kelkajn konkretajn ekzemplojn; ni supozu ke iu deziras vojaĝi tra landoj, kies lingvojn li ne scias. Li lernu Esperanton, kaj ĉe la fino de sia lernado aliĝu al Universala Esperanto Asocio. Li ricevos karton, kiu al li donos la rajton postuli de la Delegitoj la de li bezonatajn informojn, kaj plendi se li ne ricevis la servojn, kiujn li rajtas, en la limo de la regularoj; li tiamaniere povos vojaĝi en tre favoraj kondiĉoj; li bezonos nur legi el sia jarlibro la adresojn de la delegitoj kaj Esperanto-Oficejoj. En ĉiu loko, kie estas Delegito, devas ankaŭ ekzisti Esperanto-Oficejo; tio estas plej ofte magazeno, kie estas alcentrigita ĉio, kio koncernas Esperanton en sama urbo. Tie la trapasanto trovos Esperante redaktitan gvidfolion, kiu al li donos la plej urĝajn informojn pri la urbo kaj la precizajn adresojn de la Esperantianoj, al kiuj li povos sin turni por peti informojn aŭ konsilojn utilajn por sia restado. Se necese, la Delegito lin prezentos al la grupo de sia urbo, lin konigos al siaj samurbaj samideanoj; unuvorte penos faciligi kaj agrabligi lian restadon en sia loko. La turisto ne estos, do, fremda, sed ekster sia hejmo

Digitized by Google

trovos la samajn faciligojn, kiujn li ricevos en sia propra lando. Ĉar la disvastiĝo de Esperanto jam estas tre grava, oni trovos Delegitojn en ĉiuj iom vastaj lokoj, ĉefe sur la grandaj fervojaj linioj internaciaj. En la urbetoj kaj eĉ vilaĝoj de sama regiono, la Delegito elektas Subdelegitojn, kiuj plenumos la saman taskon kiel li. Iom post iom, la tuta civilizita terglobo estos kovrata de Delegitoj kaj Subdelegitoj, kiel per maŝaro, kaj preskaŭ ĉie Esperantiano renkontos alian Esperantianon, kiu utilos al li kaj penos lin helpi.

Memkompreneble, oni ne bezonas vojaĝi por uzi tiujn servojn. Ni supozu, ke studento deziras koni la kondiĉojn de studado en fremdlanda Universitato. Li simple sin turnu al la Konsulo por studentoj de la urbo, pri kiu li deziras informojn. Same se komercisto deziras scii pri la produktaĵoj de fremdlanda fabrikejo: li skribu al la Konsulo por komerco kaj industrio, kaj per li, li ricevos la bezonatajn sciigojn. Alia ekzemplo: oni konas la malfacilaĵojn, kiujn renkontas la sinjorinoj kaj fraŭlinoj, kiuj vojaĝas solaj en landoj, kies lingvon ili ne scias. Dank' al Esperanto tiuj malfacilaĵoj multe plimalgrandiĝas. La Esperantianinoj nur bezonas skribe antaŭinformi pri la horo de sia alveturo la Delegiton, kiu sendos Konsulinon aŭ Informistinon al la stacidomo. De ŝi la vojaĝantino povas ricevi la necesajn helpojn kaj konsilojn.

Rilate al dungado, la servoj riceveblaj ne estas malpli ŝatindaj; tiom pli ke en tiu rilato neniu internacia institucio jam ekzistas. Se laboristo deziras trovi oficon en fremda lando, li konigu sian peton al siaurba Delegito, kiu transdonos ĝin al la interesataj Delegitoj. Ĉi tiuj afiŝigos ĝin en sia Esperanto-Oficejo, ĝin tradukigos en nacian lingvon kaj diskonigos kiel eble plej multe. Ankaŭ la neesperantistaj komercistoj, kontraŭ negrava pago, povos uzi

Digitized by Google

tiun servon kaj konigi fremdlanden per Esperanto petojn pri oficistoj, k.a. Estas superflue insisti pri la gravegaj konsekvencoj de tiu servo, kiam ĝi estos ĝenerale disvastigita. Jam de nun Esperanto povas liveri grandan profiton en tiu kampo.—*Daŭrigota.*

KANTO DE LA VOJAĜANTOJ.

Vojaĝantoj ja ni estas
Dum la vivo, tra la mondo.
Nin la ventoj ne timigas
Nek la fulmo, nek la tondro.

Malamikoj ne minacas,
Ĉar nur havas ni amikojn.
Vera am' la kaŭzo estas
Amaj trovas ni efikojn.

Kvankam estas ni malriĉaj,
Ni bezonas pli nenion,
Ĉar al ni, la jam kontentaj,
Dio patre sendas ĉion.

Domojn belajn ni konstruas
Por ripozo dum vojaĝo.
Amon, sanon, pacon trovas
Ni, je kiu ajn etaĝo.

Eĉ la morto al ni estas
Ĉu por ni aŭ amatulo,
Novnaskiĝo; VIVO restas
Sekve por la mortintulo.

Kantu do la kanton nian
Kredu je la ver-afero.
Fidu—kaj vi trovos vian
Paradizon sur la Tero.

(*El "Laboro."*)

Originale verkita de MARGARET L. JONES.

April, 1907.

Digitized by Google

Write from dictation ten lines from Exercise 24.

Translate in class:—Whose is this garden? It is everyone's. Every kind of person may enter. How do you know? I heard it, somehow. What kind of flowers grow there? Almost every kind. Where are they? They are everywhere. Is there anything to pay? Everyone pays a penny. What do they do with the money? Everything necessary to beautify the garden. Why do they charge? Because one prefers what one pays for. How many trees are there? As many as in the park. Has anyone counted them? No one but the gardener has done so. Is it always open? It is never shut in the daytime.

This will give practice in the use of the correlative words.

HOME LESSON 24.

Write a letter to the teacher, in Esperanto, expressing your views on the language, what you have thought of the lessons, what have been your chief difficulties, and what you intend to do to further your studies and practice of the language. (Not less than 100 words).

Learn third verse of "La Vojo."

Translate:—The cat ran into the room. I put the books on the table. Good books are the best friends. This coat was bought by me, and consequently it is mine. The dog jumped on the table and upset the milk jug. When the jug was upset the milk poured out on to the floor. I woke my brother at nine o'clock. He woke with a smile and rose immediately. The building about to be constructed will be very great. My sister's photograph is very pretty. A glass of milk and a wineglass were on the table. Helen loves her sister more than herself.

Learn vocabulary.

Digitized by Google

LECTURE 25.

VOCABULARY.

aersîpo, airship.
atenti, to attend to, to be attentive.
aŭtomobilo, automobile.
enkorpigi, to incorporate.
fortika, solid, robust.
fundamento, foundation.
funkcii, to function, to work, to operate (I).
gazeto, a gazette, a magazine.
ĝeni, to bother, to trouble (T).
glavo, a sword.
idealo, ideal.
karavano, caravan.
klaso, a class.
kolonio, colony.
komunikiĝi, to communicate.
konscie, consciously.
kunpliekti, to interweave, to plait.
neŭtra, neuter.
pli malpli, more or less.
regiono, region, district.
sistemo, system.
skizi, to sketch.
socio, a community.
solidareco, solidarity.
vane, vainly.

EXERCISE 25.

PRI LA UTILECO DE ESPERANTO.

(*Daŭrigata*).

Sed ĉefe por turismo povas utili Esperanto. Ĉiu scias, kiel rimarkinde progresis turismo en la daŭro de la lastaj jaroj, sekve de la plimultiĝo de la komunikiloj; vaporŝipoj, vagonaroj, aŭtomobiloj, kaj morgaŭ, aerŝipoj. Ne mankas la materialaj rimedoj de interkomunikado, sed tamen, pro la diverslingveco la vojaĝanto tra fremda lando estas konstante ĝenata kaj malhelpata. Aliparte, kiel ajn multaj estas la vojaĝoj, ekzistas ankoraŭ malmulte da karavanoj, kiuj kondukas turistojn de unu lando al alia. La Universala Esperanto Asocio organizas por difinitaj celoj, kiel ekzemple, Esperantistaj kongresoj kaj festoj enhavantaj neŭtran kaj internacian karakteron, specialajn karavanojn, dank' al

Digitized by Google

kruj oni povas vojaĝi en multe pli favoraj kondiĉoj, sen la baroj de diverslingveco. Plie, ĉiu Esperantiano, kiu deziras pasigi libertempon kun aliaj Esperantianoj, povos facile kontentigi sian deziron sin turnante al la turisma fako de Esperantio, kiu alcentrigas ĉiujn petojn de tia speco, kaj eĉ organizas en pentrindaj lokoj, libertempajn koloniojn, kie diversgentaj Esperantianoj amike kunvivos dum kelke da semajnoj.

Kiel Esperanto ŝtilas por konigi la apartaĵojn de la naciaj lingvoj, tiel same ĝi utilas por konigi la morojn, institucioj kaj vidindaĵojn de ĉiuj regionoj. Por tio la Delegitoj eldonas gvidlibretojn, enpresigas en komunan gazeton ĉiujn lokajn informojn, enhavantajn ĝeneralan intereson. Oni atentu, ke ĉiuj supre skizitaj servoj estas senpagaj. Nur estas necese, ke ĉiu petanto pagu la respondon. Por tio, Esperantio (por forigi la maloportunaĵojn, kiuj rezultas de la diverseco de la monsistemoj), uzas neŭtran, internacian, jam tre disvastigitan monsistemon, kiu rilatas al la naciaj monoj, kiel Esperanto al la naciaj lingvoj.

Oni facile povas plimultigi la ekzemplojn pri la utileco de Esperanto. La leganto senpene ilin trovos laŭ la supre diritaj. Sed ĉefe rimarkinda estas la fakto, ke tiuj servoj estas eblaj tuj de nun, dank' al la disvastiĝo de Esperanto kaj la forta organizo de la homoj, kiuj ĝin uzas. Tre eraras tiuj personoj, kiuj asertas, ke la Esperantistoj laboras nur por la estonteco kaj Esperanto servos nur al niaj pranepoj; tre eraras tiuj, kiuj diras, ke nur kiam la tuta mondo estos Esperantistigita, Esperanto fariĝos utila. Kontraŭe, oni tuj povas uzi Esperanton, dank' al saĝa organizo, kaj, en la nuna tempo, ne la tuta mondo, sed malgranda parto de la mondo, nur tiuj homoj, kiuj iel partoprenas en la vivo internacia, bezonas Esperanton.

Digitized by Google

Estas necese diferencigi Esperantiston kaj Esperantianon. Esperantisto estas nomata ĉiu persono, kiu uzas Esperanton por kia ajn celo; Esperantiano estas nomata ĉiu persono, kiu kontraŭ malgrava pago, aliĝis al difinita asocio, kies celo estas la plifaciligo de la interhomaj rilatoj per Esperanto, kaj kiu por tiu celo organizas difinitajn servojn, uzeblajn nur de ĝiaj anoj. Oni ne kredu, ke la materialaj servoj, supre priskribitaj, malhelpos aŭ mallumigas la flankon de Esperantismo kiel socia kaj ideala movado tia, kia ĝi estas diversfoje aludita de Doktoro Zamenhof. Kontraŭe, ili valorigas tiun flankon de Esperantismo; ili enkorpigas tiun internan ideon, pri kiu tiel ofte parolis la kreinto de Esperanto. Esperantismo celas al la reciproka sinkomprenado kaj alproksimigo de ĉiuj homoj sur neŭtrala fundamento. Per tiuj vojaĝoj, per tiuj diversaj servoj internaciaj, per la konstanta interhelpado, kiun al si reciproke faras ĉiulokaj kaj ĉiuklasaj Esperantianoj, oni vere laboras al la efektivigo de la supra celo; sen tiu materiala alproksimiĝo, ĉiuj vortoj pri frateco vane sonas. Tiu ĉi ideo naskis Esperanton, kaj levas ĝin alte super simpla lingva signo pli malpli perfekta. Kiam la diversaj servoj nun kreataj ĉiutage funkciados, iliaj uzantoj konscie aŭ nekonscie sentos, ke super la gentaj bariloj kunplektas ilin fortika ligilo de solidareco, kaj tiam veriĝos la profetaj paroloj de Zamenhof:

Sur neŭtrala lingva fundamento,
Komprenante unu la alian,
La popoloj faros en konsento
Unu grandan rondon familian.

Verkita por "The Esperanto Manual" de H. HODLER
(*Vice-president and Co-founder of The Universal Esperanto Association*).

Geneva, Switzerland, July, 1908.

Take from dictation ten lines from above article.

Digitized by Google

"La Espero" is perhaps the best known of all the poems of Dr. Zamenhof.

LA ESPERO.

En la mondon venis nova sento,
Tra la mondo iras forta voko;
Per flugiloj de facila vento
Nun de loko flugu ĝi al loko.

Ne al glavo sangon soifanta
Ĝi la homan tiras familion:
Al la mond' eterne militanta
Ĝi promesas sanktan harmonion.

Sub la sankta signo de l' espero
Kolektiĝas pacaj batalantoj,
Kaj rapide kreskas la afero
Per laboro de la esperantoj.

Forte staras muroj de miljaroj
Inter la popoloj dividitaj;
Sed dissaltos la obstinaj baroj,
Per la sankta amo disbatitaj.

Sur neŭtrala lingva fundamento,
Komprenante unu la alian,
La popoloj faros en konsento
Unu grandan rondon familian.

Nia diligenta kolegaro
En laboro paca ne laciĝos,
Ĝis la bela sonĝo de l' homaro
Por eterna ben' efektiviĝos.

Verkita de L. ZAMENHOF.

Digitized by Google

Interpunkcio.

Esperanto punctuation is very simple, and generally speaking, a comma is placed between each two clauses; otherwise it is about the same as for other languages. Words are generally divided at the termination of a root.

, *komo*, comma.
. *punkto*, full stop.
; *punktokomo*, semicolon.
: *punktoduo*, colon.
! *signo ekkria*, exclamation mark.
? *signo demanda*, point of interrogation.
— *streketo*, dash.
' *apostrofo*, apostrophe.
ˆ *supersigno*, accent over letter.
( ) *parentezoj*, parentheses.
" " *citaj signoj*, quotation marks.

Respondu al la demandoj :—

Kio estas Esperantiano ?
Kiu estis unu el la fondintoj de la U.E.A. ?
Kio estas ordinare la demando farita de la lernanto de Esperanto ?
Kion ricevas la nova Esperantiano ?
Kiajn rajtojn donas tiu karto ?
Se la Esperantiano intencas vojaĝi, kion li faras anue ?
Kiam li alvenos al fremda urbo, kio okazos ?
Kion faras la Esperantianino, kiam ŝi estas forvojaĝonta ?
Kiu renkontos ŝin?
Kie ŝi estos renkontata ?
Rilate al la dungado, kion faris la U.E.A. ?
Kio ekzistas jam en la ĉefaj urboj ?
Kie fine ili ekzistos ?
Por kio utilas la Esperantaj oficejoj ?

Digitized by Google

Kion oni povas aĉeti tie ?
Kion ankaŭ oni povas fari en ili ?
Ĉu estas Esperanto oficejo en via urbo ?
Kiu estas la plej proksima ?
Ĉu vi intencas aliĝi al tiu societo ? k.t.p.

HOME LESSON 25.

Learn fourth verse of "La Vojo."

Learn vocabulary and all forgotten words in past lessons.

Read through the whole of Exercises 24 and 25.

Carefully study your past errors, and practise the correct form of sentences in which errors have been made.

Make sure that you know all the correlative words.

Digitized by Google

LEGAĴOJ.

VOCABULARY.

abelo, bee.
akordiĝi, to be in accordance with.
aŭtomate, automatically.
bubeto, baby boy.
centjaro, or **jarcento,** a century.
cirkonstanco, circumstance.
dediĉi, to dedicate.
difekti, to spoil, to defect.
donaco, a gift.
eĥo, echo.
ekonomio, economy.
eksperimento, experiment.
ekzerci, to exercise (T).
farmi, to farm.
ferdeko, deck (of a ship).
filozofio, philosophy.
fosilo, spade.
fruktodoneco, fertility.
gajni, to gain, to win.
harpo, harp.
heroo, a hero.
ĥirurgo, surgeon.
instinkto, instinct.
intelekta, intellectual.
juvelo, a jewel.
kaĝo, a cage.
klimato, climate.
konfidi, to confide.
konservi, to conserve, to keep.
konsoli, to console.
kritiki, to criticise.
kulturi, to culture.
kutimo, custom.
longa, long.
iuli, to lull, *lullaby.*
masonisto, mason.
merito, merit.
metio, craft, trade.
mielo, honey.
mieno, mien, appearance.
miksi, to mix.
muskolo, muscle.
naturo, nature.
nesto, nest.
parkere, by heart, by rote.
planti, to plant.
